

Bô Yin Râ

# LA FANTOMO DE LA LIBERECO

Kobersche Verlagsbuchhandlung  
Basel – Leipzig 1930

El la germana originalo  
(„Das Gespenst der Freiheit“, 1930)  
tradukis A. Rehfeldt (<http://www.a-rehfeldt.de>)

## Fatamorgano

Tie ĉi estu parolate ne precipe pri la *vera libereco*, kiu trovis poetojn kaj heroojn, – eĉ se poetoj kaj herooj ofte, kvankam *nekonscie*, batalis kaj suferis ĝuste por tio, pri kio ni tie ĉi nun devas pleje paroli, pro la vero.

Ne la aspirinda celo sopirata de ĉiuj, kiuj sentas sin *ne-liberaj*, estu tie ĉi nun senvalorigata, – sed mi volas rigore dissolvi la *mokan bildon*, kiu, hodiaŭ pli ol iam, *trompas* tiujn, kiuj soifas liberecon. –

Tie ĉi povas esti helpate nur per *heligo*, kaj nur *vivanta* lumo povas sukcesi detrui la trompon de tagaj revoj, kiu – portata de la sufokaj nebuloj de tro tereca esperado kaj sopirado – ĉiutage forlogas sennombrajn viktimojn en la senesperan solejon de hororaj dezertoj.

Sed plue validos la vero, ke oni povas helpi nur al tiuj, kiuj akceptas *konsilon*, kaj tial mia vorto povas helpi nur tie, kie la *volo* estas preta *aŭskulti* min ...

Mondoŝanĝon rezultigas la vorto, kie ĝi estas *akceptata* kun maldorma volo, sed malmulton ĝi povas peri al la animo, kie *rezisto malebligas* la akcepton!

Ne ĉiam temas pri signo de *saĝeco*, se la orelo *fermas* sin kontraŭ avertanta vorto, kaj certe ne montriĝas profunda *prudento*, se oni *turnas sin for* de io neatendita.

Mi devos diri kelkajn parolojn, kiuj sonas malmulte agrable al kelkaj homoj, kaj mi devos paroli pri aferoj, kiuj al la plej multaj homoj hodiaŭ fariĝis *nerealaj*.

Sed ne ĉio, kio por iuj estas *nekaptebla*, devas tial resti *nekomprenebla* por la aliaj, kaj vere ne estas karakterizaĵo de la *realo*, ke ĝi devas plaĉi ankaŭ al tiuj, kiuj preferas *revi*, kie ili devus *pensi*, tiel ke ili fariĝas *blindaj* pri ĉio kio *superas* la alton de iliaj revoj.

Nur tiuj migrantoj en dezerto, kiuj mem *konas* la vojon al la oazo, kapablos distingi miraĝon en la varmega aero super fluetanta sablo disde la konata *realo*.

Eĉ se la vojaĝokaravano, kiun spertulo pri la dezerto devas konduki, estas preskaŭ senfina, la opinioj de ĉiuj novuloj tamen ne estas konsiderindaj kompare kun la scio bazita sur sperto, kiu devigas la spertulon moderigi la ĝojon kaj ekspliki kiel *trompan bildon* tion, kio *estas* nur trompa bildo ...

Mi estas sperta tie ĉi kaj *povas* konsili kaj helpi, al tiuj, kiuj ankoraŭ *volas* akcepti konsilon kaj helpon.

Tiu, al kiu miaj vortoj eble sonas „arogante“, ankoraŭ ne *konas* min.

Mi estas devigita diri al li, ke mi venas el landoj de la animo, en kiuj neniu el la tie konscie vivantaj povus glori sin antaŭ aliaj pri *aparta* ekkono.

Ĉar ni vivas kaj estas konsciaj en la *sama* lumo, ĉiu strebado al prioritato de unu antaŭ alia estus al ni plena *malsaĝo*.

Kiom pli malsaĝa devus esti al mi la deziro glori min antaŭ *tiuj*, kiuj ankoraŭ *ne* vivas en la landoj de la lumo!

Sed mi fariĝus mensoganto, se mi volus kaŝi, ke *ankoraŭ alio* ĉiutempe estas ĉeestanta kaj malfermita al mi, ol ĉio tio, kio tie ĉi surtere estas ne pli proksima nek pli malproksima al mi, ol al *ĉiuj* miaj kunhomoj. –

*Milionoj* da homoj hodiaŭ opinias, ke nenio alia mankas al ilia feliĉo, ol sole „*la libereco*“.

Tiel pensas ne nur la enprizonigito, sed ankaŭ la princo, kiu devis rezigni pli ol unu privilegion, kiun liaj prauloj iam ĝuis. –

Sed preskaŭ ĉiuj vidas nur la logadon de *fantomo de la dezerto*, kiu faras predo de „sovaĝaj animaloj“ ĉiun, kiu bona-fide sekvas ĝin ...

Kie bedaŭrinde tiom multaj estas de unu kredo, de unu espero kaj de unu amo, tie estas malfacile por unuopulo travidi la trompon, kaj tro volonte li lasas sin forlogi per la senlima potenco de la erara iluzio de la amaso.

Estante vere sufiĉe sperta pri malfeliĉo, la homo penas trovi la elirvojon al sia „*savo*“, kaj fariĝas al li „sankta“ ĉiu *trompa bildo*, kiu brilante promesas al li konduki lin al lia savo.

Tiumaniere la *fantomo de la libereco* akiris *potencon* en la mondo de homoj, kaj ĝi jam minacas konduki sur malĝustan vojon preskaŭ ĉiujn, kiuj strebas al *vera libereco*.

Nedifinita, kaj nebulece disfluanta laŭ la maniero de nuboj, estas la ŝajna formitaĵo, kiu hodiaŭ estas *rigardata* de la plej multaj kiel „*la libereco*“.

Sed *vera libereco* montriĝas nur *klara kaj difinita*, ĉar ĝi bezonas fiksitan *formon*.

Nur en tia memformiĝo *vera libereco* povas *daŭre ekzisti* kaj havi liberigan *efikon*.

Se ĝi *ne* havus formon, ĝi konsumus *sin mem*.

„*Senlima*“ libereco estus samsignifa kun *memneniigo* de la liberulo. –

Libereco kiu restas nur *nocio* kaj ne povas esti *sentata*, estas *senvalora* por la homo!

Nur *io limigita* estas *sentebla*.

Nur *limo* donas *formon*, kaj *sentado* restas gardita kontraŭ disfluado nur ĉe bone limigita formo.

*Formo* estas *ekvilibrigo* inter „*tro multa*“ kaj „*tro malmulta*“.

Kie *vera libereco* regas, tie oni ne povas paroli pri „*tro multa*“ aŭ „*tro malmulta libereco*“, ĉar „*tro malmulta*“ *neus* ĝian ekziston same kiel „*tro multa*“ ...

Kie tia mezurado estas ankoraŭ *ebla*, tie regas nur la *fantomo*, al kiu la homo povas „*mezure*“ asigni potencon laŭ sia arbitro. –

Vera libereco neniam estas celo en si mem!

Vera libereco ricevas sian valoron de la celoj, al kiuj ĝi *servas!*

Vera libereco estas la frukto de plenumita *neceseco* kaj servu al tio, ke *io pli alta* ol libereco estu atingata!

Neniam la libereco arogas al si la rolon de mastro de la volo, ĉar libereco *servas* al la volo!

Sed la *fantomo de la libereco* celas la *subjugigon* de la volo, penas *ensuĉi* ĉiom da volo, por mem resti en potenco ...

La *fantomo de la libereco* estigas en ĉiuj sekvantaj ĝin: frenezan avidecon je *io senlima!*

La *fantomo de la libereco detruas* ĉiun kapablon *senti formon!*

Tiel ĝi ruinigas ĉiun certecon de *ekkonado*, ĉar *ekkonado* estas ebla nur tie, kie *formo* estas sentata...

Sed ne vane la antikvaj saĝuloj parolis pri „neekkonado“ kiel pri „*kulpo*“, – pri kiu vorto mi jam atentigis en alia loko...

*Kulpo* estiĝas, kie *donita forto* kaŭzas *damaĝon* al la posedanto aŭ al ties kunestaĵoj, ĉu per *misuzo*, ĉu per *preterlaso de ĝusta uzo*!

Kiu do la trompan bildon, al kiu li sklavigis sin, plue sekvas, kvankam miaj paroloj konsilis al li, *mem* havigi al si la *certecon*, ke nur „*fantomo*“ trompas lin, tiu apenaŭ povos deklari sin libera de propra kulpo.

Sed ĉar ĉiu kulpo postulas, kaj kun plena certeco *devigas*, sian *sekvon*, li ne devos miri, se la sekvo vokita de li mem estas sur lia spuro kaj eble atingas lin ĝuste tiam, kiam li laŭsupoze *ekkaptas* tion, kio estis nur la spegula bildo de nebuloj de seka pensado en malplena aero: – *spekulativa reva bildo* – „*fatamorgano*“. –

## Neceseco

Kiom ajn alte la antikvaj grekoj starigis siajn diojn, iliaj saĝuloj tamen konis *pli altan*, misteran principon, al kiu, laŭ ilia pensmaniero, eĉ la dioj estis subordigitaj: – „ANANKE“, t.e. la neceseco.

Kiu volas forturni sin de la „fatamorgano“ de la ĉien ŝanĝiĝanta, sensubstanca *ŝajno* de la libereco, – kiu finfine malligas sin de la *fantomo de la libereco*, – tiu daŭrigu la legadon.

La saĝo de la antikvuloj probable estas ankoraŭ sentebla al lia animo...

Li ja certe serĉis *la veran liberecon*, kiam li antaŭe renkontis ĝian *fantomon*, al kiu li donis sian kredon nur tial, ĉar li *rigardis* ĝin kiel la arde sopiritan liberecon *generitan de la realo*.

Se li nun volas fine ekkoni la karakterizan signon de vera libereco, tiu signo eklumos tie ĉi al li en neatendita heleco, kiam li vidas la homojn de antikva tempo subordigi siajn diojn, *la plej liberajn inter liberuloj*, al la *neceseco*. – –

La cerbonaskita *fantomo* ĉiam rapide scias *ombri* la signon de la *vera* libereco, kaj vekis per ravaj bildoj la freneze konfuzan esperon, ke la libereco kapablas liberigi ankaŭ de ĉiu postulo de la ordono de l' *neceseco*...

Sed *vera libereco* rezultas nur el la perfekta *plenumado* de tiu ordono.



Ankoraŭ neniu *vere* liberiĝis, kiun la *neceseco* ne „deklaris libera“. –

Sed al kiu la trompa bildo havas la *saman* valoron kiel la *vera* libereco, tiu vere ne estas inda je la libereco.

Esti *libera* signifas: pensi, paroli kaj agi laŭ la volo de la *neceseco*! –

Vere, *neniu* potenco iam povos rabi al li la tiel akiritan liberecon!

Sed tiuj blindigitaj de la fantomo scias malmulton pri tio, kion tiu libereco malfermas al tiu, kiu sciis akiri ĝin. – –

Neceseco ne estas „devigo“, – alie vere neniu *povus* kontraŭagi ĝin!

Neceseco estas tio plej alta, spirita *ordiganta* en la homo, kiel en ĉio vivanta, kaj ĝuste tion la antikvuloj volis esprimi, kiam ili starigis „ANANKE“ eĉ *super* la *diojn*!

Devigo estas nur *terece* kondiĉita perforto: – la vera *kari-katuro* de la neceseco!

Oni povas *devigi* vin, kaj vi povas devigi aliulojn, fari multajn aferojn, kiuj certe ne respondas al la *neceseco*. – –

*Neceseco estas la donita ordo de la kosma strukturo, en kiu la individuo estas inkludita.*

Neniu povas eligi sin el tiu strukturo kaj ĝia ordo eĉ nur por momentoj, eĉ se li provas nei, por sia imago, ĉion krom si mem!

Reale li ĉiam restas *unuigita* kun la nemezurebla tuto, – li damaĝas *sin mem*, se li ne konformas al tiu *tuto*, kaj damaĝas la *tuton*, se li ne scias disvolvi *sin mem* el interna ordo. –

Sed nur la *reala okazado* estas tie ĉi decida!

La revulo, kiu sidas en sia kaverna kaj ekscitas sian fantazion, ĝis ĝi estigas en lia imago laŭelekte ĉiun regnon de spi-

ritoj, – la distingita estetikulo, kiu apartigas sin de la mondo de ekstera moviĝado kaj agado, nur por vivi „en beleco“ kaj, malproksime de la ĉiutaga vivo, naski sian mondon de vortoj, – por la nemezurebla tuto ili havas la saman valoron kiel la brutala plezuravidulo, kiu servas nur al siaj ĉiam ekscititaj animalaj instinktoj. – –

La „*realo*“ de tiaj trompitoj de iluzio estas kompatinda homo, kiu subfalis al sia *egoismo* kaj ne plenumas, kion postulas de li „ANANKE“: la *neceseco* ordiganta super ĉiuj dioj ĉiun vivon. –

*Senesenca* restas tio, kion ajn li kreis al si kiel sian *propran mondon*, eĉ se li sukcesas havigi al ĝi spegulan bildon en miloj da aliaj homocerboj.

Nenio *reala* estas atingita per tio.

Se vi volas veni al *reala libereco*, vi devas *plenumi*, kion *neceseco* laŭokaze *ordonas* al vi plenumi.

La *fantomo de la libereco* ekscitos vin, tiel ke via fantazio streĉiĝas super ĉiun pensadon!

Al vi kaj al aliaj vi faros postulojn, kiuj estas bazitaj ne sur *neceseco*, sed sur la devigo de via „superstreĉita“ *pensado*...

Ĉar vi „postulas“ *tro multe*, vi povas „akiri“ *nenion* aŭ nur *tro malmulte*, kaj tio, kion vi tiam avidege penas *rabi*, estos tuj prenata for de vi fare de tiuj, kiuj antaŭe estis viaj kunuloj...

Ĉiuj, kiuj sekvas kun granda hasto la *fantomon* de la *libereco*, perdas la *mezurilon*, kiu *sola* aplikiĝas al ĉia vivo.

Vian *kritikon* vi nomas „*rajtigita*“, – sed kie vi volas trovi en vi *rajton por dezertigo*? – –

Kritiko estas kvazaŭ torento fluanta de malvarmegaj glaĉeroj.

Oni devas *digi* ĝin, se ĝi alportu benon. –

Estas kompreneble, ke vi volas vidi vian tutan ĉirkaŭaĵon ordigita laŭ *via* deziro, – sed ĉu vi *mem* estas jam ordigita *en vi*?!

Kiel vi povas atendi, ke la tuto, kies eta ĉelo vi estas, konformigu sin sole al *viaj* deziroj?!

Nur tiam vi lernos ekkoni, kio servas al via bono, se vi lernas fidi la *necesecon*.

Nur ĝi povas instrui vin, kio *daŭre* restos via posedaĵo, post kiam vi akiris ĝin.

Nur la *plenumado* de la ordono de la *neceseco* povas alporti al vi la *veran* liberecon, al kiu vi sopiras, eĉ se vi ankoraŭ estas ligita al la eraro, ke libereco devas doni sin al vi kiel *arbitron*. – –

Griza kaj malluma fariĝis la vivo ĉiam tie, kie oni postulis *liberecon*, sen plenumi la ordonon de la *neceseco*.

Poste la sensubstanca *fantomo de la libereco* leviĝas super vastaj landoj kaj venenas per sia mortiganta spiro ĉiujn ĝermojn de *volo al vera libereco*. –

Ĉiu portokapablo de la animo estas superata de la *respondeco* de tiuj, kiuj – eĉ se bonafide – prenas sur sin la taskon konduki aliajn al trompa bildo, kiu forlogas en tian malesperon. – –

Sed *neportebla* estas ankaŭ la respondeco de la *forlogito*, kiu ne povis rezisti, kiam oni promesis al li neblaĵon, kvankam li vere povis scii, ke ĉio, kio tie ĉi surtere ne strebis al konformiĝo al tio, kion la *neceseco* prezentis al li, neeviteble

devis perej, eĉ se tereca devigo haltigis tiun pereon por kelka tempo...

La *neceseco* kalkulas kun *aliaj* tempoj ol tiuj, kiuj povas fariĝi superrigardeblaj en la vivo de tera homo.

*Neniam* ĝi povas „*miskalkuli*“, ĉar ĝi estas *valoro* kaj *enhavo* de ĉiu nombro.

La tuta *realo* en la tera kaj supertereca ekzisto baziĝas en ĝi.

Ĝi portas la firmamenton de la svarmoj da sunoj, kaj ĝiaj ordigantaj potencoj donas mezuron kaj formon al ĉiu sablero en la dezerto.

*Vane* la homo serĉas fonton de tera savo, kiu povus daŭre flui *sen* tia firma strukturiteco.–

*Vane* strebas al *libereco* tiu, kiu serĉas ĝin *aliamaniere* ol en la plenumado de ĉiuj postuloj de la *neceseco*.

Ne nur la *dioj* devas klini sin antaŭ „ANANKE“, sed ankaŭ – la *tera homo*...

# Komuneco

La homo bezonas *sur tiu ĉi tero* komunecon, same kiel ankaŭ *en la spirito* li povas sperti sin nur *en komuneco*.

*Komuneco* en la *ekstera* vivo signifas: – unuigi tion, kion vi *posedas* kiel „*opinion*“, kun la „*opinio*“ de *aliuloj* tiu-maniere, ke el la opiniado de *ĉiuj* fariĝas komuna posedaĵo.

Ĉiu unuopulo havas *alian* „*opiniadon*“, en kiu li komprenebligas al si tion, kio dum multaj fiŝkaptoj de lia pensado fariĝis *lia* posedaĵo.

Sed la „*opiniado*“ de ĉiu unuopulo povas esti *unuigata* kun tiu de aliulo, kaj tiel estiĝas *komuneco*.

Tiam ĉiu prenas sian parton de la „*opiniado*“ de la alia, kaj formiĝas, kiel io komune „*opiniata*“: tio *komuna*.

Sed la *neceseco* igas la homon serĉi ion komunan eĉ tie, kie *kunliganta* „*opinio*“ *mankas*, precipe se devas esti forigata iu *mizero*, kiu laŭ *ĉies* „*opinio*“ estas tre malfacile eltenebla...

En nia tempo ekzemple la *plej ampleksa* komuneco ekzistas surbaze de ĝenerala *nekontenteco*.

Tie ĉi nur malmultaj estas ekskludeblaj.

Antaŭ ĉio la nekontenteco rilatas al la formoj, kiujn la homa *socia vivo* inventis al si por propra sekurigo, eĉ se tia sekurigo kelkfoje signifis la pereon de l' individuo.

Kaj tie ĉi la nekontenteco tre ofte estas *pravigita*.

Estas malsaĝe, konstrui komunuman vivon ne konsiderante la bonon de l' individuo, kiu ja estas *konstrubriko* de la tuto, kaj povas ĝoje servi la komunumon nur *tiam*, se ĝi servas al li konservi sin mem.

Sed temas pri la sama malsaĝo, se la unuopulo tiom mistaksas sin mem, ke li rigardas sin mem rajtigita, *pro sia nura ekzisto*, postuli komunuman servon por si, ĉu en alta aparta pozicio, ĉu por provizi la bezonojn de lia vivo...

Mi *ne* celas la samon, kiam mi parolas pri „*komunumo*“ aŭ pri „*komuneco*“.

Kio apartenas al la *komunumo*, ne apartenas al mi, – sed ja tio, kion mi havas *en komuneco* kun aliaj.

Antaŭ ĉio, „*komunumo*“ estas por mi *ekstera* kunigo, dum „*komuneco*“ koncernas la *animon*.

La unuopulo do ne povas postuli, ke la komunumo dividu kun li, nur *pro lia ekzisto*, la valorojn, kiuj apartenas al ĝi.

*Li mem* unue devas, *per sia propra laboro*, fariĝi „kunposedanto“ de la komunuma posedaĵo, kaj lian „parton“ difinos la *valoro*, kiun la *komunumo* atribuas al lia *laborrezulto*.

Estas sensece, postuli tie ĉi *alian* mezuron de valoro.

Ĉiam la komunumo alte taksos tion, kies *mankon* ĝi *sentus*, se ĝi ne havus ĝin.

Sed kiel oni povus atendi, ke la komunumo taksu *miloble* ofertatan talenton tiom alte kiom iun *apartan servon*, kiun ĝi *bezonas?!*

*Neniu* formo de komunumo povas trakti tian situacion aliamaniere.

Unuopulo eble povas havi rajton esti nekontenta vidalvide al la komunumo, sed la komunumo restas ne malpli ĉe *sia* rajto.

Se vi faras ion, kio sen vi *mankus* al la komunumo, ĝi donos al vi „kunposedon“ de sia propraĵo en la *sama* mezuro, kiel ĝi sentas sin „*pliriĉigita*“ per via laboro.

La *nombro*, laŭ kiu oni *taksas* vian laboron, difinas la „*pagon*“ kiun vi ricevas. –

Sed se vi diras, ke vi ne *povas* fari tion, kion la komunumo bezonas, vi mem konfesas vian *nekapablon*, kaj vi ne devas plendi, se oni ne prezentas al vi *parton* tie, kie vi ne havas ion por doni aŭ prezenti, kion oni ŝatas. –

Ne utilos al vi, se vi *plendas* pri la „*malgranda komprenemo*“ de la komunumo, kiu ne povas taksi vian kontribuadon laŭ la valoro difinita de vi.

Sed *komuneco* montriĝas alia!

Tie ĉi oni estimos tion, kion vi havas por alporti, kiel ateston de viaj kapabloj, eĉ se oni certe neniam sentus ĝian mankon, kaj samtempe oni atendos de vi, ke vi estimas la kontribuadon de ĉiu *aliulo*, kondiĉe ke ĝi ne restas sube de lia kapableco.

Oni penos helpi al vi, kiom oni *povas* helpi, sed oni ankaŭ atendos *vian* helpon, kie vi povas helpi.

Sed oni antaŭ ĉio demandos vin: *kiu vi estas?!*

La *komunumo* demandas nur pri la rezulto kaj *kvanto de farita laboro*, – *komuneco* demandas pri la *tuta homo!*

Ne pli frue ol tiam, kiam komunumo *ne kontentigas sin* pri sia formo, sed *levas sin al anima komuneco*, malaperos ĉia nekontenteco, – kvankam la neegaleco *devas* pluekzisti, ĉar ĝi estas laŭnature kaj laŭspirite *necesa*.

Nia *komunuma vivo* malsanas je la *hardiĝo* de la arterioj, kiuj alkonduku al ĝi sangon por ĝia subtenado...

Ĝi povos saniĝi nur tiam, se ĝi povas esti pli kaj pli ŝanĝata al vera *komuneco!*

Jam nun oni opinias, ke oni portas aŭ posedas tion kaj alion „en komuneco“, – sed tie ĉi la vorto komuneco estas monero havanta malgrandan valoron, kaj ankoraŭ tro mankas tio, kion ĝi prave signifas.

Oni ankoraŭ tute ne estas preta, estimi la „opinion“ de aliu ĝuste pro tio, ke ĝi estas lia „siaĵo“ – pro tio, ke ĝi estas *lia propraĵo*.

*La labora povumo* ankoraŭ ĉie estas taksata laŭ ĝia aktuala kapablo plimultiigi materian valoron, dum la *homo* restas sen ia atento, se li ne estas bezonata por *prezenti* sian povumon al la komunumo, kiu rekompencas lin por la prezentado.

Mankas ankoraŭ *multo*, se el la komunumo fariĝu komuneco. –

Homo en la *komuneco* estas *bone konscia* pri sia propra valoro kaj ĉerpas *el tiu memkonscio* ĉian estimon, kiun li koncedas ankaŭ al *aliulo*.

Li scias, ke li povas proksimiĝi al sia *propra* disvolviĝo nur en la sama mezuro, en kiu li helpas al *aliuloj* atingi sian memdisvolviĝon.

„Komuneco“ *kondiĉas* veran *liberecon* en la kadro de la *neceseco*, dum „komunumo“ tute ne gardas kontraŭ tio, ke oni fariĝas la predo de la *fantomo de la libereco*.

*Komunecco* ekvilibrigas ĉiujn *kontraŭojn*, ĉar ĝi scias, ke *tio malgranda* estas inkludita en la *neceseco* ne malpli ol *tio superanta* la amason.

Anima komuneco trovas sian unuan kampon de aktiveco en la *familio*.

Benitaj estas la membroj de familio, kiuj scias uzi ĝin!

Plue etendiĝas tiu kampo de aktiveco al *administraj komunumoj*, *lando*, kaj *landoj*...



Al *ĉia* homa vivo ĝi prezentas spacon kaj prosperon.

Al ĉiuj ĝi kapablas sekurigi *veran liberecon*, en la kadro de la *neceseco*.

Sed se la libereco estas *komuna* al ĉiuj, vere plu neniu volos *forpreni* ĝin de aliulo.

Ĝi estas sekurigita, kiel la neminacita „*propraĵo*“ de ĉiu unuopulo.

Ĝi fariĝis *posedaĵo*, kaj ne plu estas revo de la sopiro.

Sekve plu neniu povas esti delogata al tio, ke li postkuras la *fantomon* de libereco, kaj kie ĝi renkontas lin, li mokridante turnos la dorson al ĝi.

Tiam ankaŭ neniu opinios sian liberecon *malpliigita*, se la *neceseco* instruas lin subordigi sin kun multaj aliaj al unu volo, en kiu la komuneco unuigas la *multajn volojn*. – –

La *unueco* estas la *prakomenco de la multeco*, sed ankaŭ la *plej alta krono de la multeco*.

Nur *sub unueco* povas vera *libereco* konservi sin en *multeco*.

Sed unueco restas *rigida* kaj *sterila*, se ĝi ne elstaras super *multeco* unuigita al ĝi.

El multeco *leviĝas unueco*, , por *unuigi* la multecon en si.

Tiel *perfektiĝas komuneco*.

Tiel *komuneco* konstruas sin mem al *piramido*, kaj kronas sin mem en sia plej alta unueco. – –

Sed ne *elekto* kaj *arbitro* devas decidi pri tio, kion tie ĉi nur vera *libereco* kapablas konstrui.

Kaj nur laŭorde *enmetita* en la *tuto*, la *unuopulo* fariĝas *portanto* de tiu *unueco*, al kiu *komuneco* *levas* sin el si mem, se ĝi en si *perfektiĝis*. –

## Aŭtoritato

Mi vidis homojn agadi, kiuj postulis ion eksterordinaran de ĉiuj *aliaj*, – sed ne kapablis meti la plej etan postulon al *si mem*.

Mi vidis aliajn, kiuj postulis ion preskaŭ superhoman de si mem, sed atendis la samon ankaŭ de aliaj.

Ambaŭ estas neeblaj, kie regas *vera libereco*.

Ambaŭ ne povas trovi pravigon antaŭ la ordonoj de la *neceseco*.

Unu homo eble tiom egalas alian, ke oni povas preskaŭ konfuzi ilin, kaj tamen neniu estas la anima egalaĵo de iu alia.

Ke vi kreis al vi mem *mezuron* por tio, kion vi postulas de *vi*, ne donas al vi la rajton uzi la saman mezuron, kiam temas pri via *kunhomo!*

La mezuro de ĉiu homo estas difinita de lia *denaska* „ĝust-mezureco“.

Multo estas detruata kun la plej bona intenco, ĉar oni koncedas al si „*rajtojn*“ surbaze de plenumitaj devoj, sen demandi sin, kio estas la bazo de la „rajto“ transmeti al *aliuloj* la postulon, kiun oni libere metis al si mem kaj kiun oni plenumis.

Prave eĉ la infano obstinas kontraŭ tia altrudita ŝarĝo, – prave ankaŭ la junulo rifuzas ĝin, se li ne estas devigata submetiĝi, interne kolerante.

Certe mi tie ĉi ne parolas pri la influo per *ekzemplo*, influo kiu lasas al tiu, kiun ĝi celas, ankoraŭ ĉian *liberecon*, sed pri tiu malbona speco, kiu penas necedeme altrudi al aliuloj tion,

kion ĝi rigardas ĉe *si* kiel valoran, – ne havante la plej etan scion pri tio, ke la veraj valoroj de tiuj aliuloj eble estas al ĝi por eterne *fremdaj* kaj tial tute *neekkoneblaj*. –

Sed kiel tiu konvinkita pri sia valoro milfoje turnis folion, tiel same nun turnu ĝin ankaŭ la aliulo, super kiu li ricevis potencon...

Sennombraj estas la ekzemploj de la ĉiutaga vivo, kiuj montras la emon al tiuspeca devigado, sed multaj estas ankaŭ la duone detruitaj vivoj, kiuj apenaŭ povas disvolviĝi, ĉar tro multe da tima zorgo, aŭ rigida obstinemo, *elpelis* la liberecon el ili...

Sed kie la libereco estas elpelata per devigo, tie la devigo tuj fariĝos *malbona* gvidanto: – *forloganto*, kiu instruas sekvi la *fantomon* de libereco. –

Aŭtoritato estas plene akordigebla kun la libereco de tiuj, kiuj sin mem subordigas al ĝi, kaj neakordigebla kun ĝi restas nur la *bildo*, kiu nur *trompe prezentas* liberecon kiu ŝajnas esti ekstere de la eterna *neceseco*. –

Sed devigo estas subfosanta *neniiganto* de ĉia aŭtoritato, ĉar ĝia rigidforma postulo estas enrompo en la *rajton je memdecido* de la aliulo.

Eĉ tie oni laŭeble evitu la devigon, kie la bono de tiu celata de ĝi ŝajnas nepre postuli ĝin.

Devigo ĉiam restas malbona *anstataŭaĵo*, – eĉ tie, kie ĝia uzo kelkfoje ne *povas* esti evitata.

Sed en tre multaj okazoj devigo estus *evitebla*, se ekzistus *vera* aŭtoritato, kiu estas memvolita esprimo de memcerta libereco en la plenumado de la neceseco. – –

Kie *devigo* estas ankoraŭ bezonata por apogi „*aŭtoritaton*“, tie oni devas demandi: – ĉu *vere* ankoraŭ *ekzistas* aŭto-

ritato aŭ nur ties *moka bildo*, kiu per devigo penas konservi sin.

Aŭtoritato povas esti bazata nur sur *fido* prezentita en *libereco*.

Kie mankas la certeco, ke oni vidas *sian propran bonon* gardita, tie por ĉiu libera homo jam estas *detruita* tio, kion vera aŭtoritato bezonas kiel bazon.

Kiel ĉio, kio staru firme en sekureco, dependas de la grundo portanta ĝin, kaj de la fundamentoj enigitaj en la grundon, tiel same ankaŭ aŭtoritato, – kaj ĝi restos en neminacata ekzisto nur tiam, se neniu tajdo povas sublavi, neniu nokta animalaro subfosi ĝin...

Ne tio, kio rajtigas sin mem esti nomata „aŭtoritato“ de aliuloj, sekve *estas* aŭtoritato, sed oni vane atendas la disvolviĝon de iu ajn homa kapablo tie, kie ne *aŭtoritato* praktikas la rajton de *direktado*. – –

Ankaŭ ĉiuj, kiuj intencas *faligi* rajtigitan aŭtoritaton, sin submetas konsciavole al *propra* aŭtoritato, kiu postulas plej striktan obeon. –

Tiam devas fine montriĝi, kie ekzistas *vera* aŭtoritato, kaj kie nur *devigo* kaj *persvado* penas akiri rajtojn, kiujn la fido antaŭe estis doninta, sed estonte ne plu povas atribui...

En tia okazo la decido eble longe prokrastiĝos, – sed fine venkas la *neceseco*, kiu povas lasi aŭtoritaton pluekzisti nur *tie*, kie *libereco* kaj *fido* estas ĝia bazo.

Kie oni sekvas la *fantomon* de libereco, tie furiozas tuj ankaŭ la ronĝanta avido faligi ekzistanten aŭtoritaton, por stariĝi per deviga forto *propran* aŭtoritaton en la sama loko.

Povas daŭri tre longan tempon, ĝis la terura sekvo de tia epidemio devigas la trompitojn fine ekkoni, ke ili detruis, kion ili estus devintaj *utiligi*...

Tamen la tago de ekkono ĉiam venis, kaj ve al tiuj, kiujn trafas la hajlo da ruinaĵoj, kiam ilia propra aŭtoritato disfalas!— —

Sed la *neceseco* ĉiam sciis *restarigi* veran aŭtoritaton, firme bazitan de fido en vera libereco, kvankam ĝi ne povis redoni la oferojn, kiujn erara sopirado antaŭe postulis...

La vivo ree kaj ree scias sukcese defendi la neeviteblajn leĝojn de sia memkonservo, eĉ se arbitro arogas al si la starigon de siaj propraj leĝtabuloj...

Eĉ la *plej pura* intenco devas fine malsukcesi, se ĝi volas ŝanĝi *tion*, kion *neceseco* postulas, por ke vivo ne pereigu sin mem. — —

Sed ĉar ekkono ne estas marĉande aĉetebla, kaj ĉar tro ofte *nura avideco je prestiĝo* volas venki, pensante, ke ĝi povas fari ŝanĝon en la maniero reve imagita, *nura prudento* postulas, ke oni neniam blinde donu la *rajton pri aŭtoritato* al iuj, kiuj rekomendas la renverson de *ekzistanta* aŭtoritato kiel rimedon por atingi la liberecon. —

Oni ĉiam povas esti certa, ke tiuj, kiuj per tiu konsilo varbas anojn, sekvas memblindigite nur la *fantomon* de libereco, ne suspektante la malfeliĉon, renkonte al kiu ili kondukas sin mem kaj aliulojn.

Sed kie vera aŭtoritato *ekzistas*, bazita sur la fido de tiuj, kiuj metis sin mem sub ĝia gvidado, tie la memcerta ekkono tute ne sentos la memdeciditan subordigon kiel *malpliigon* de la *libereco*.

Vera aŭtoritato estas ĉiam gardita en si mem kontraŭ rigidiĝo, ĉar ĝi restas movata de la individuaj voloĵ de ĉiuj, kiuj unuigas sin al ĝi en libera agnosko.

Starigita en la ekkono de la ordono de la *neceseco*, la aŭtoritato alportas al tiuj fidantaj ĝin la helpon, kiun ili bezonas por *plenumi* la ordonon, plenumado, el kiu sola povas rezulti la vera libereco. –

Tial ĉia *misuzo* de atribuita aŭtoritato estas *preskaŭ nepardonbla kulpo*, – sed tia misuzo ĉiam juĝas sin mem per tio, ke ĝi subfosas la *fidon*, sur kiu sola povas aŭtoritato *baziĝi*, tiel ke, kie ajn misuzo okazas, pli aŭ malpli frue devas disfali tio, kio laŭmerite perdis la rajton de pluekzistado.

## Partiemo

Estas praprofunde entenate en la homa naturo, ke tiuj, kiuj aspiras al la sama celo, strebas al *unuiĝo*.

Kion unuopa volo neniam povus fari, tio ofte ja realiĝas per la kolektado de *multaj* volo, kaj la propra opinio trovas memĝuon, se ĝi renkontas la saman konvinkon ankaŭ en aliu-  
loj.

Sed *multoblaj* vidmanieroj povas celi la saman objekton, kaj la celoj de tre *diversaj* sopiroj aperas alstrebindaj al homoj.

Do certe ne estas sence, se *diversspecaj* unuiĝoj formiĝas, por strebi al *diferencaj* celoj. El tia multeco povas leviĝi riĉa vivo, se oni provas formi el la unuopaj unuiĝoj *ampleksan* unuiĝon, kiu sin direktas al celo *superanta* la apartajn celojn de ĉiuj unuopaj partioj.

Ne estas malfacile trovi tian celon, se ĝi estas serĉata tie, kie temas pri la bono de *ĉiuj*, kaj tia celo devas jam esti atingita antaŭ ĉiuj apartaj celoj, kaj *post* ĝia atingo ankaŭ *sekurigas* tion atingitan.

Kiel multo, kiun povas atingi la *unuiĝo* de multaj, restas neatingebla al *unuopulo*, tiel same restas ankoraŭ neplenumita al ĉiu unuiĝo multo, kiu helpe de ampleksa „*unuiĝo de unuiĝoj*“ povas esti plenumata.

Sed rara estas tia kolektado, kvankam ĝi devus esti faro kutima kaj ĝenerala!

Ankoraŭ tro raraj estas la unuopuloj, en kiuj estas *venkita* la blinda avido de animalo, kiu sin ĵetas sur la manĝaĵon de

sia samspeciano, eĉ se ĝi per tio sovaĝe distretas la nutraĵon prezentitan al ĝi mem.

Ankoraŭ tro rara estas la *estimo por fremda opinio*, – tro rara la ekkono, ke eraranto povas esti helpata nur tiam, se li en si mem jam konsciis sian eraron. –

Ĉiu opinias nur sin mem certa pri la *plej bona scio*, kaj vidas en ĉiu alia, kiu opinias sin *same bone scianta*, nur *mal-amikon*. –

Tiel estiĝas *disiĝo* kaj *dissplitiĝo* tie, kie nur konstanta *kollektado* povus iam aperigi la veran *valoron* de ĉiu unuopa opinio. – –

Ofte oni ligiĝis kun samopiniuloj nur tiucele, ke oni aŭdu la propran individuan voĉon miloble kiel eĥon, – ĉar oni tute ne estas tiom certa pri sia scio, kiom oni kelkfoje pensas, kaj oni tro baldaŭ aŭdus la *dubon* ronĝi tiun certecon, se ĝi ne estus supersonata de la ĥoro de la multaj, kiuj samamaniere volas konservi sian memcertecon...

Tiam ĉiu *alia* unuiĝo estas malestimata kaj kontraŭata, ĉar ties anoj elpensis por la sama „melodio“ *diferencan tekston*, kiun ili opinias ne malpli enhavoriĉa, kaj bone motivita.

Sed ĉar ĉiu homo havas sian *propran* opinion, kiu ĉiam iel *distingiĝas* de tiu de ŝajne plena samopiniulo, ĉiu unuiĝo, se ne devigo ankoraŭ tenas ĝin kune, povas esti splitata en pli kaj pli malgrandajn splitojn, ĝis fine ĉiu individuo kvazaŭ formas partion *nur por si mem*.

Nur la regado de la *neceseco*, el kiu *neniu* sfero de la vivo *povas* eligi sin, preventos tian finan splitiĝon.

Sed ne estas preventeble, ke la apartiĝemo *ene* de jam apartigitaj unuiĝoj kaŭzas gravan damaĝon per tio, ke ĝi tiom blindigas la unuigitojn, ke ili mem ne plu ekkonas, kion



unuiĝo povas rezultigi, se ĝi restas fidela al sia natura baziĝo, kiu postulas *kolektadon*. – –

Kion ajn diras la kredotezo kunliganta la unuigitojn, – kiel ajn la samopiniantoj pensas, ke estas solvebla tio, kio vehe- mente postulas solvon, – tamen la *valoro* de komuna agado ĉiam restas kondiĉata de la vivoforta pruvo, ke la elektitaj iloj de agado kapablas doni *permanentan* rezulton, kaj nur la kon- stanta *ekzamenado* de antaŭe formita opinio povas en ĝi aparti- gi la bonon disde la malbono. –

Sed ĝuste tiu ĉi konstanta *ekzamenado* de antaŭe formita opinio fariĝas neebila tie, kie dissplitiĝemo volas kontentigi sin per novaj kaj novaj tezoj.

Kie oni devus nur flustri, oni tiam *krias*, kaj kie oni devus zorge kribri, oni amasigas rubon sur la ĝermivajn grajnoj- troveblajn en ĉiu homa opinio logike kontrolita.

Oni forgesis, ke ĉiu homa *unuiĝo* posedas en si *vivorajton* nur tiam, se ĝi celas *kolekti*. – –

Se iam estiĝu vera *komuneco*, nur la spiritgenerita senso de *kolektado* povos krei ĝin, en vera *libereco* kondiĉata de la neceseco.

Laŭ antikva sankta sciigo, la plej dia el la teraj homoj di- ris:

„Kiu ne *kolektas* kun mi, tiu *disĵetas*.“

Se iam homa vorto estis „*vorto de Dio*“, tiam ĝi estis pa- rolata tie ĉi! – –

*Ne kolekti*, – *ne celi kolekti*, – jam per si mem estas: *disĵeti!* –

Ĉiu influo de la supertereca *spirito*, kiu povas fariĝi anime kaptebla al la homo sur tiu ĉi tero, ĉiam celas „*kolekti tion, kio perdiĝis*“. Eble vi, surbaze de restriktita perceptmaniero,

opinias, ke tio, kion aliuloj ekkonas kiel *superterecan*, – ĉar ili spertis ĝin same kiel la propran memsentadon, – estas bazita nur sur fiziksensa perceptado. Eĉ tiuokaze vi tamen koncedos, ke la emo al *kolektado* vere estas de *pli alta* naturo ol la malluma instinkto, kiu ree kaj ree celas disĵeti, detruu tion organe en si mem kolektiĝintan. –

*Frenezon* vi vidus aktivi, se iu volus dissolvi en fortaj acidoj iun el la impresaj marmorstatuoj kreitaj de granda antikva skulptistoj, prezentante la argumenton, ke tiam certe estiĝos el la malkomponita ŝtono nova verko, kiu tuj kompensas la perdon de tiu neniigita.

Tio, kion krea forto maturiĝinta en la *spirito* iam formis por konservi en ĝi la plejbonon de la tera homaro, vere estas tro valora, ol ke oni nun frivole fordonu ĝin al *detruado*. – –

Tro valora estas tio, kion altaj homaj spiritoj kolektis dum jarmiloj, ol ke oni povus fordoni ĝin al disĵetado, sen preni sur sin hororan kulpon kontraŭ ĉiuj venantaj generacioj. – –

Kiel viaj fingroj estas interligitaj je la mano, kvankam ili povas moviĝi unuope, tiel same ni teraj homoj de la sama tempo estas nevideble en interligiteco.

Eĉ se vi fuĝas en la dezerton, aŭ trovas en malproksima maro dezertan insulon, kie neniam antaŭe vivis homo, vi ne povos eligi vin el tiu nevidebla interligiteco de ĉio vivanta.

Se vi detruas ĉirkaŭ vi ĉiun signon de samtempa *alia* homa vivo, tamen tiu ĉi ĝenerala vivo povos – per la ritmo de plej fajnaj vibroj imantaj en ĝi mem – ĉiam atingi vin, kaj tio, kion vi pensas aŭ sentas, neniam perdos la signon de via tempo.

Vi hodiaŭ ne povas fuĝi el via tempo, eĉ se vi sentante kaj pensante „enprofundiĝas“ en longe pasintan tempon, – kaj vi

ne povos vivi „ŝtonepokan vivon“, eĉ se vi penas retiri vin el ĉiaj formoj de kulturo. –

Sed vi povas elekti inter *valoro* kaj *eraro*, ĉar ĉiu tempo lasas ĝermi *samtempe* ion, kio progresigas la homaron, kaj ion pereigan.

Vi ne *devas* fariĝi viktimo de kosmaj disonancoj, eĉ se en via tempo tia okazado trovas tie ĉi surtere sian plej malproksiman finiĝon en homaj cerboj...

Ne unuafoje io simila okazas tie ĉi surtere, sed ĉiam ekzistis unuopuloj, kiuj sciis *ŝirmi* sin kontraŭ la frenezaj avidoj, kiujn la cirkulado de la materio en la universa spaco de tempo al tempo povas vekti en la sango de la tera homo...

Estu egala al tiuj *prudentuloj*, kaj konservu, kontraŭ la partio ĉirkaŭanta vin, vian *rajton je memdecido!* – –

Nur vi iam devos pravigi vin *antaŭ vi mem* pri via tuta farado dum tiu ĉi surtera vivo, – kaj neniom utilos al vi, ke vi fine ekkonas, ke estis profunde malsaĝe, fordoni la propran *estantecon* pro „estonteco“, kiu fuĝas ĉiutage pli foren. –

Se vi ne volas *nei* vin mem, vi devas, estante memdecidita, „*voli*“ la al vi *fremdforman* ekziston de aliuloj same decide kiel vian propran ekziston, ĉar ĉiu unuopulo estas *kondiĉita* de la aliaj en sia tempo kaj ĉiam ligita kun ili, eĉ se ili ŝajnas tute nekompreneble „fremdaj“ al li. –

Sed se vi „*malamas*“ tion, kio estas *alia* ol vi, tiam vi nekonscie estas *via propra malamiko*, ĉar vi povas *konservi* vin mem en tempo kaj eterneco nur el tio, kio estas *ne* vi mem...

## Misa ekonomiumado

Ĉu la *plej eta* ekonomia unuiĝo: la malgranda mastrumaĵo de juna paro, aŭ la *plej granda popola unuiĝo*: ŝtato riĉa je homoj, ĝojige prosperas, estas principe decidata de la *sama leĝo*.

Por teni *zorgon* malproksima, en ambaŭ unuiĝoj oni devos kalkuli la rimedojn, kiujn oni *povas* elspezi, ĉar ili dum la sama tempo estas denove *akireblaj*, – kaj en ambaŭ oni anticipe devos krei rezervon por kovri *neordinarajn* monpostulojn, kiuj ne povas esti *kompensataj* per samtempa mongajnado...

Ĉio ĉi estas farebla en la plej malgranda unuiĝo apenaŭ pli facile ol en la plej granda, kvankam *proporcie* al la grandeco de unuiĝo kreskas la *komplikeco* de la kompensado postulata de la *neceseco*.

Tie kaj tie ĉi vera *libereco* estas atingebla nur, se ĉiu *foriĝo* de portempa posedaĵo estas plej zorge kompensata per nova *akiro*, kaj tie kiel tie ĉi la *fantomo* de la libereco konstante logas al elspezado de remedioj, al kiuj ne povas sekvi anstataŭaĵo rezultanta el regula akirado.

Sed dum en tre *limigitaj* homaj unuiĝoj pleje nur *malmultaj* suferas damaĝon, se la koncernaj respondeculoj lasas sin delogi kaj sekvas la *fantomon* de la libereco, la *ŝtata mastrumaĵo* devas, en la sama okazo, kaŭzi damaĝon al *miroj* kaj milionoj da homoj, kiuj kredis, ke la sekureco de ilia vivo estis gardita.

Tia trompo de fido, kiu samtempe rabas al la unuopuloj ilian ekonomian memfidon, fariĝas fatala, ĉar ĝiaj sekvoj *ne*

*finiĝas*, paralizante la energion kaj aktivecon de ĉiuj *tiuj*, el kies laborado sola povus ankoraŭ veni kompenson. –

Sed krome ĝi estigas la eraran opinion, ke „*la ŝtato*“ estas nur tiu senpersona formitaĵo, kiun fuŝe praktikata ŝtadadministrado vere povas fari el ĝi, laŭ ĝia ekstera formo, – kaj forgesigas, ke „*la ŝtato*“ reale estas nenio alia ol *la sumo de ĉiuj ŝtatanoj*, kiuj estas kunligitaj en ĝi...

Tial okazas, ke multaj homoj, kiuj en la malgranda ĉirkaŭo de sia ĉiutaga vivo sen ia dubo agadas *konsciencie* kaj *laŭleĝe*, tamen subite lasas gvidi sin de *aliaj* maksimumoj, tuj kiam staras antaŭ ili „*la ŝtato*“, anstataŭ samŝtatano.

Homoj, kiuj certe ne estus kapablaj strebi al kontraŭleĝa gajno je la kosto de *unuopulo*, kelkfoje estas tuj pretaj preni ĉion, kio estas akirebla, se „*la ŝtato*“ aperas kiel kontraŭulo, aŭ se prezentiĝas la eblo havigi al si iun ajn nelaŭleĝan avantaĝon je la kosto de la *ŝtata posedaĵo*.

Oni tiam opinias, ke la propra agadmaniero estas bone pravigita per la mencio, ke la kontraŭleĝa gajno ja okazis nur „*koste de la ŝtato*“, kaj oni opinias nenecesa la demando, de kiu do „*la ŝtato*“ ricevis – por ke ĝi *administru* ilin – la remediojn, kiujn oni frivole forprenis de ĝi. –

Senpripense, kaj ne sentante la konsciencen tro malpura, oni tiel lasas sin forlogi – per la kompakta majesto de la nocio „ŝtato“ – al tio, ke oni kontraŭleĝe havigas al si gajnon *je la kosto de siaj samŝtatanoj*...

Oni ne scias, aŭ ne volas scii, ke oni prirabas nur *ĉiujn unuopulojn*, se oni *prenas* de la ŝtato ion, kio ne estas *akirita* per *propra ekvivalenta servo* farita al la aliaj. –

Sed tuj oni scias, ke temas pri *maljustaĵo*, kiam oni vidas *aliulojn* agi en la sama maniero, ĉar oni tamen instinkte sen-

tas, ke oni ankaŭ kiel ŝtatano *suferas perdon* rezulte de *ĉiu* damaĝo, kiun „*la ŝtato*“ suferas.

Sed kelkaj homoj vidas tian „maljustecon“ ankaŭ tiam, kiam ili havas *envion* pro tio, ke eble *aliulo* povus tondi la ŝtatŝafon, kies lano estus same utila al la vidanto de malbonfaroj, kondiĉe ke li mem estus povinta proksimiĝi al ĝi...

Ekzistas tro multaj formoj de damaĝo malzorgeme kaŭzita al la ŝtatoj per nepripensita konduto kontraŭ ĉio, kion „la ŝtato“ administras, ol ke estus praktike valore, nun prezenti kompletan liston de ili.

En miaj libroj mi ja volas doni al miaj legantoj ĉiufoje nur novan *indikon* pri la aferoj, kiujn ili atentu, kaj tute ne intencas akiri la reputacion, ke mi ĉie tute „elĉerpas“ tion, kion la koncerna temo trovas jam kolektita en la animo kaj en la pensado.

Nur *malbone* legos kion mi skribas, kiu ne *kunlegas* tion, kio estas intence „*en-ŝlosita*“ en ĉiu dirformo, por ke trovi ĝin tiuj legantoj *mem*, kiuj en la premo de la ĉiutaga hasto ankoraŭ ne perdis la kapablon *kunpensi* dum legado...

Tial ĉiu, kiu legas kun atentaj sensoj, kion mi havas por diri tie ĉi, ne bezonos tutan kolekton da ekzemploj por scii, pri kio tie ĉi temas.

Ĉiu tago vere alportas *tromulton* da malbonaj ekzemploj, kaj oni ne devos *serĉi* tion, kio *nedezirate* ĉie renkontas nin...

Sed kie oni ne atentis, kaj eble eĉ ne *komprenas*, ke *ĉio*, kion „*la ŝtato*“ povas administri kaj distribui, estas kontribuita de tiuj, kiuj mem *formas* ĝin, – tie baldaŭ grava *konfuzo de nocioj* abunde kreskante kovros ĉiun animan klarecon.

Tiam estos rigardata kiel „*konservanta la ŝtaton*“ ĉio, kion la *homoj subtenataj* sole de la ŝtato faradas por sekurigi la konstantan fluadon de *sia fonto de nutraĵo*, sen konsideri la samŝtatanojn kiuj ja *kunfluigas* tion, kio konservas la ŝtaton. –

Tiam aliaj nomos „*rajta postulo*“ kontraŭ la ŝtato ĉiun *postulon*, kiun neniu, kiu ankoraŭ aŭdas sian konsciencon, aŭdacus meti al ĉiuj *unuopuloj*, kiuj kune kun li *rezultigas* la „ŝtaton“. – –

Oni deklaras „*ŝtata devo*“ ion, al kio neniu korporacio de unuopuloj povus iam esti devigata per *tera* leĝo bazita sur laŭracia pensado, kaj ankoraŭ multe malpli per *spirita* leĝo. –

Kaj ĉio ĉi nur tial, ĉar oni sentas la „ŝtatan posedaĵon“ malligita disde ĉiuj *unuopuloj*, kiuj ja ĉiutempe *formas* ĝin per la *individua kontribuaĵo*, per kiu ili kiel ŝtatanoj lasas ŝarĝi sin pro la tutaĵo.

Rezulte de freneza miskompreno oni rigardas *tiujn* ŝtatanojn, kiuj *administras* la posedaĵon de la ŝtato, kiel la nereŝtriktitajn *mastrojn* de tiu posedaĵo, kaj direktas sian koleregon kontraŭ ili, se ili estas nekapablaj arbitre plenumi ĉiun deziron, kiu estus plenumebla nur tiam, se tiu ĉi tero estus „*Kuklando*“, kaj ne plu enmetita en la strukturo de la *neceseco*.

Tial devas *necese* rezulti *misa ekonomiumado*, se la ŝtatanoj administrantaj tion, kio el ilia kontribuaĵo kaj tiu de la aliaj ŝtatanoj fariĝis „ŝtata posedaĵo“, prezentas tiun ŝtatan posedaĵon al ĉiuj *postulantoj*, kvankam nova *kontribua imposto*, kiu povus kompensi tion fordonitan, estas akirebla nur per celmaltaŭga *forkondukado de alfluo*j, kiuj solaj gardas la *fonton* de ĉiuj *kontribujaj impostoj* kontraŭ definitiva *elĉerpigo*. – –

Samamaniere devas rezulti *misa ekonomiumado*, se la ŝtata mastrumaĵo eligas sennombrajn homojn – uzante ilin kiel helpantojn de la administracio – el *produktiva* laboro, por kiu ili estus tre bone taŭgaj.

Samtempe rezultas grava *demoraliziĝo*, se oni per edukado al kutimigas la unuopulon al la opinio, ke surbaze de sia ligiteco kun la ŝtato li havas la privilegion de *ŝtata nutrado*, – ĉu en la ofico de ne tre bezonata administra helpanto, ĉu nur tial, ke li scias devigi la ŝtaton elaĉeti sin el ties senrespondeca volo al sabotado...

Estas *sendigne*, insisti pri restado en ofico sole pro monakirado, se oni facile povas ekkoni, ke intensa laboro de multe *pli malgranda nombro* de administrantoj povus teni la ŝtatan mastrumaĵon en plej bona ordo, – kaj ĉiu *sendignigas sin mem*, se li uzas sian potencon por *malhelpi* la ŝtatan prosperon, devigante sian samŝtatanojn *aĉeti* de li la *neuzadon* de la supera forto atingita nur per tiu *ekscesa* nombro. Tio rezultigas pli kaj pli etendiĝantan *neniigon de ebloj de laboro*, kiuj povus prezenti, al tiu malsaĝe misuzanta sian potencon, paŭzo kaj sufiĉan prosperon sur la bazo de lia *propra* povumo, se ili ne tiumaniere estus detruataj de li mem...

Ĉie la brila *fantomo* de la libereco konfuzas la cerbojn, kaj oni opinias, ke la – vere ne malgranda – *mizero* estas facile *forigebla*, ĉar oni rigardas la ordonojn de la neceseco senpune *ĉirkaŭireblaj*; sed ankaŭ en la ekonomia vivo ili *neniam* estas ĉirkaŭnavigeblaj sen tio, ke ili poste estigas *multe pli preman* mizeron. – –

La sama logado fare de trompa spegulaĵo de eraraj esperado kaj sopirado jam de longe malsanige penetras la tutan *ekonomian vivon* en ĉiuj landoj.



Ĉie la ekonomia mizero tiom kreskis, ke la homoj jam preskaŭ en ĝi sufokiĝantaj estas tro pretaj fidi al ĉiu *erara konkludo* generita de trostreĉita cerbo, kaj rapide *rezigni* pri la restanta kapablo por propra prudenta pensado, kiam la arde sopirata savo ŝajnas proksimiĝi...

En febra timo antaŭ pli kaj pli granda premo de la zorgoŝarĝo de l' ekzisto, oni ne ekkonas, ke estas nur „*fatamorgano*“ tio, kion tro memcertaj gvidantoj reklamas kiel la oazon longe serĉitan, kiu estingos ĉian mizeron...

La ekonomia mizero, kiu ĉion en la ĉirkaŭo malheligas, jam antaŭ longe paralizis ĉiun *kapablon distingi*, tiel ke oni volonte lasas sin trompi, kvankam lastaj reagoj de ĝustaj instinktoj ree kaj ree frapas al la pordo de la animo, por vekti la dormantan *prudenton*, ke ĝi preventu tion, kio ankoraŭ estas *preventebla*.

Ke *ankaŭ* oni mem vere estas *kulpa* pri tia mizero, tion konscias nur *plej malmultaj*...

Tro konformas al ekscese kultivita kritikemo, ke oni serĉas ĉiun *kulpon* pri memkreita malbono nur ĉe *aliuloj*.

Dum tie temas pri la „*ŝtato*“ rigardata kiel io senpersona, kiun oni deziras ŝarĝi per la sekvoj de sia propra malsaĝeco, tie ĉi en la interna ekonomia vivo temas pri *pli malgrandaj* homaj unuiĝoj, kiuj same estas rigardataj kiel la radika grundo por ĉia malbono. Kaj – ĉar erara konkludo kutime turniĝas en rondo – oni opinias, ke mizero estas rapide forigebla, se oni nur submetas al la *ŝtata administrado* tion, kio ja bezonas *sekurecon*, kiun sendube *la ŝtato* povas doni, sed kio tamen, *laŭ siaj naturo kaj proporcio, atingas fruktodonantan prosperon nur tiam*, se ĝi, – en la ekstera kadro de ŝtataj leĝoj, – disvolviĝas *laŭ propra leĝo* bazita sur neceseco...

Sed same kiel oni rigardas la „ŝtatan posedaĵon“ kiel *ne-nies propraĵon*, oni tie ĉi lasas sin forlogi al la penso, ke la rimedoj disponigitaj de *unuopuloj* kaj *produktivigitaj* en la ekonomia vivo estas *malligitaj* disde ĉia homa rilato.

Kiel oni opinias sin bone pravigita, kiam oni povas havigi al si kontraŭleĝan gajnon aŭ avantaĝon „*koste de la ŝtato*“ *sen fari ekvivalentan servon*, – tiel same ĉiu opinias sin rajtigita *ekspluati* la rimedojn de *aliuloj*, tuj kiam *unuopuloj* libervole disponigas al *ekonomia organismo* tion, kio restus sterila kaj neproduktiva, se la unuopuloj konservus ĝin ĉe si.

Ekzistas multaj, kiuj ŝuldas siajn *nutraĵon* kaj *subtenon* nur al tiaj *produktivigitaj* rimedoj de unuopuloj, kaj certe neniam estus kapablaj kontraŭleĝe alproprigi al si la koncernan propraĵon de *unuopulo*, – sed ili apenaŭ volas obei sian konsciencon, kiam temas pri malpliigo de la *propraĵo de aliuloj*, kiu en ekonomia organismo fariĝis *laborilo*, por konservi ne nur sian proprietulon, sed ankaŭ ne malmultajn el ties kunhomoj...

La „*firmao*“ aŭ la „*kompanio*“ estas rigardata kiel io *sen-persona*, kaj tio, kion *unuopuloj* libervole konstruis per sia *persona* propraĵo, ŝajnas al pli ol unu, kiu ricevis sian laboron en tia unuiĝo, esti *aĵo sen posedanto*, kiun li senskrupule opinias disponebla por *propra* utiligado, se ŝtata leĝo ne povas malhelpi lin.

Malvastspirita mistaksado de la rezulto de propra laboro krome ebligas al la kulpiĝanto trovi kvietigon de sia konscienco sur la ŝajna bazo de la „rajto“ „*rekompenci sin*“, se la *interkonsentita salajro* por la postulita laboro ŝajnas *nesufiĉa* al la laboranto kiel ekvivalento.

Sed ĉu lia laboro fakte alportas *al la ekonomia organismo*, kiu *sola* faras produktivan faktoron el ĝi, la *valorojn* necesajn

por ke ĝi plue tenu sin sur tia nivelo, ke ĝi *povas* daŭre *pagi* la iam *interkonsentitan salajron*, – tiun demandon rare iu metos al si, kvankam la respondo, kiun ĝi trovas, decidas la *tutan estontecon* de la entrepreno mem, same kiel de tiu, al kiu ĝi donas pagitan laboron...

Ankaŭ la privata ekonomia vivo fariĝas *misa ekonomiumado*, se ne estiĝas *ekvilibro* inter tio „*elspezebla*“ kaj tio „*enspezebla*“.

Ankaŭ tie ĉi estas *sendigne* por ĉiu unuopulo, se li provas konservi al si sian postenon nur pro sia *salajro*, kvankam li ekkonas, ke li *ne* estas *bezonata*, kaj ke la ekonomia organismo, kiu nutras lin, suferas *damaĝon*, ĉar la nombro de dungitoj estas tro granda rilate al la kvanto da farenda laboro.

Tio certe estas malfacile komprenebla por iu koncernata, aparte se li devas nutri edzinon kaj infanon kaj ekonomie subteni la propran mastrumaĵon, kvankam *alia* eblo gajni monon *ŝajnas* al li neekzistanta.

Sed kie ekzistas nedubebla *volo* labori, tie baldaŭ troviĝas ankaŭ *vojo* por akiri monon en *pli digna* maniero, eĉ se oni devas *ŝanĝi* la *specon* de laboro.

En pli frua tempo multaj homoj sukcesis akiri monon nur en *malproksima*, *fremda* lando transmara, ĉar ili lernis fari laboron, kiun oni *bezonis*, kvankam ĝi *ne* konformis al ilia antaŭe kutima laboro. Nun ne plu estas malproksima la tempo, en kiu oni ankaŭ en sia *hejmlando* tute ne bezonos „honti“ pro la sama strebado.

*Vera volo* labori jam hodiaŭ ĉie estigas ankaŭ novajn *eblojn* labori.

Laboro *meritas* sian pagon, kaj ankaŭ en la nuna malfacila tempo *vera volo* labori havigos al si la laŭmeritan *salajron*,

kondiĉe ke ĝi sukcesas liberigi sin de la ne plu konvena deviga konvencio, kiu en la „malnova“ mondo de Eŭropo ligas tiom multajn homojn kaj provas firme teni ilin en la profundaj vojsulkoj de kutimoj. – –

Ke laboro estas „*malbone pagata*“, ĉiam estas signo de tio, ke ĝuste por tiu speco de laboro ekzistas tro granda *proponado* de laborvolaj homoj, kaj ĉiu, kiu insiste volas fari nur ĝuste tiun ĉi specon de laboro, kvankam ĝi jam antaŭ longe *trovis sufiĉon* da kapoj aŭ manoj, fariĝas *malutilulo* por tiuj jam dungitaj, kvankam ne gajnante la plej malgrandan avantaĝon por si mem kaj nur barante al si mem la vojon. –

Necesas serĉi laboron *tie*, kie ĝi estas *trovebla*!

Eĉ se temas pri speco de laboro, kiu ŝajnas malmulte „*konforma*“ al vi kaj kiun vi iam antaŭe malestimis, ĝi tamen povas fine alporti vin al celo, kiu tute ne estus tro malgrava al vi, se vi povus atingi ĝin *hodiaŭ* – rekte kaj *tuj*. –

Sur tiu ĉi tero neniam mankas *eblaj* por laboro, – sed troe mankas homoj, kiuj finfine *pretas* akcepti *ĉian* eblon por laboro. – –

Sed la ekonomia vivo povas „saniĝi“ nur tiam, se ĉiu *ŝajna* aktivado fariĝas *neebla*, – kaj ankaŭ la *ŝtata mastrumaĵo* saniĝos en ĉiuj landoj nur en la *sama* maniero.

Kie ankoraŭ hodiaŭ estas parolate, kun eluzita patoso kaj ebrie de senenhavaj vortoj, pri la „*rajto pri laboro*“, tie oni devas demandi: ĉu oni vere celas *la laboron* aŭ eble anstataŭe nur la laŭsupozan rajton, bazitan sur la ŝajnige prezentita preteco labori, ricevi socialan *subtenon*, kiu ja povus esti realigata nur per la rezulto de la laboro de *aliuloj*...

La *rajto* pri laboro ne devas esti malaltigata ĝis „postulo“, ĉar la *devo* labori ne povas esti *prenata for* de iu tera homo. –

Sed tro multaj pensas, ke ili jam plenumas tiun devon, se ili nur *ŝajnige* faras tion...

Sed vera *voló labori* rigardas kun bedaŭro sur personon *ŝajne laborantan*. kiu celas prezenti eksteran *geston* anstataŭ *anima memrealiĝo*, kiu esprimiĝas en *ĉiu*, eĉ la plej *kruda* laboro.

Ke laboro estas ankaŭ rimedo por *akiri monon*, estas entenate en la *spirita naturo* de la tera homo, same kiel *volupto* estas denaska parto de la *animala naturo* por sekurigi la *plu-generadon* de ĉiuj animaloj. — —

Kiu estas *kapabla labori* kaj ne *amas la laboron* kiel la manieron de memprezentado de sia animo, tiu estas ankoraŭ tre for de tie, kie li suspektas en si sian *superterecan* eston, — eĉ se li estas la plej fervora defendanto de kredo, al kiu li estis alkutimigita per edukado. — —

Ankaŭ la *ekonomia vivo* de tiu ĉi surtera ekzisto estas, en ĉiuj siaj eksteraj formoj, strikte limigita per la *neceseco*.

Kio ne scias adaptiĝi al la ordo de la strukturo de la *neceseco*, tio devas *perei*, eĉ se scienco kaj plej aŭdaca tekniko celas doni al ĝi *alian bazon*. —

Ĉia vivo estas konstanta *prenado* kaj konstanta *donado*.

Nur *eterne valida* leĝo tie ĉi povas decidi, ĉu la ĝusta *ekvilibrigo* rezultas.

Tio, kion homa malprudenteco *elpensas* al si por *eligi* sin el la sfero de tiu leĝo, kreas nur *ŝajnajn formitaĵojn*, kiuj estas same pasemaj kiel la nubformoj submetitaj al konstanta ŝanĝado.

*Io daŭranta*, kio, *doninte prosperon al generacioj*, estigas el si novan formon *iom post iom kaj apenaŭ rimarkeble al la*

*homaro*, – povas estiĝi nur tie, kie ekestas laŭeterneca *ekvilibriĝo*, en kiu ĉiu unuopulo sentas sin inkluzivita.

Nur kiam ĉiu unuopulo ekkonas, ke li damaĝas sin mem, se li pro sia propra avantaĝo kaŭzas *malavantaĝon* al *aliuloj*, malaperos ĉiu *misa ekonomiumado*, kiu hodiaŭ minacas senfortigi tutajn popolojn.

Sed tie ĉi helpos neniu bone elpensitaj *teorioj*, kiom firme bazitaj en si mem ili eble ŝajnas!

Tie ĉi nur *praktika elprovado* povas konduki al ekkono, kaj tiam *sperto* instruos plej sekure, kaj en la granda kaj en la malgranda kadroj, kiel oni povas *eviti* tion, kio devis rezultigi *misan ekonomiumadon*...

# Konkurenco

Kie laŭforme sama varo aŭ servo estas ofertata de *malsamaj* homoj, tie oni ne povas malaprobi, ke interesiĝanto pri tiu varo aŭ servo atentis ĝian *kvaliton* kaj donas preferon al la pli bona.

Estas tute indiferece, ĉu temas pri *malaltaj servoj* kaj *ĉiutagaj bagatelaĵoj*, aŭ pri *altaj kapabloj* kaj *grandioza verko*.

Ĉiu pligrandiĝo de homa kapablo – de lerta *povo*, saĝa *ordigado*, ĝis la plej alta, *artobazita kapablo formi* –, ĉiam estas altgrade kondiĉata de la prioritato ĉiutempe donita al tio perfekta antaŭ tio neperfekta.

Se *servo*, aŭ ties *produkto*, estas destinita al *ĉiutaga* uzo, la sola neceso *protekti* sin kontraŭ *damaĝo* devigas onin preferi tion plej bonan, kaj kiam la servo aŭ produkto celas *pli altan* bezonon, konanto de tio, kion *aliuloj* antaŭe *atingis*, ne kontentigos sin per io *malpli bona*.

La sekvo de tiu konstanta elektado estas la konkurado inter *ofertantoj* de la servo aŭ varo por akiri la favoron de ĝiaj *bezonantoj*.

Tiurilate konkurenco estas bazita en *neceseco* kaj estas esprimo de *libereco* generita de la realo.

Vi estas *libera elekti* tion, kio *servu* al vi, kaj kion vi volas havigi al vi per la prezento de difinita *ekvivalento*, – kaj sammaniere vi estas libera *adapti* la aferon, kiun vi volas surmarketigi, al la postuloj, kiujn oni tie metas al ĝi.

Vi ne suferos maljustaĵon, se la elektanto preterpasas vian „servon“, „varon“ aŭ „verkon“ pro tio, ke li povas trovi *ion pli bonan*.

Ankaŭ vi ja povas elekti, ĉu vi volas kontentiĝi prezentante *moderan* laborrezulton, aŭ ĉu vi volas oferti tion vian *plej bonan*.

Se vi decidis, propravole aŭ devigite de neceseco, oferti tion *vian plej bonan*, tamen devas nun montriĝi, ĉu vi ekkonas la amplekson de via *laborkapablo*, – ĉu vi scias apliki al vi mem la *ĝustan mezurilon*...

Vi plendas pri „*malsukceso*“ kaj trovas amarajn vortojn pri la „maljustaĵo“, kiun *via* opinie oni faras al vi, – sed vi ne demandas vin, ĉu vi mem vin *mistaksis*, celante oferti servon aŭ varon, kiun vi certe neniam kapablos plenumi aŭ fari. –

Eble vi povas, en *modera* kadro, fari *ion vere plej bonan*, dum vi vane penas venki en konkurado kun tiuj, kiuj *laŭ sia naturo* estas kapablaj por multe pli grandaj aferoj. –

Sennombraj homoj sentas sin „persekutitaj de misfortuno“ kaj envie rigardas aliajn, kiujn oni preferis al ili, ĉar ili sciis pli bone, al *kiu* postulata nivelo ilia plej alta laborrezulto ankoraŭ povas *konformi*. – –

Sennombraj spertas ŝiprompon, ĉar ili havas ja bonan, sed *tro malgrandan* boaton por transveturi oceanon, kaj tamen ili ne povas bridi sian ambicion, kiu forlogas ilin riski veturon sur la alta maro. –

Kiu volas partopreni en konkurado, tiu devas antaŭ ĉio koni *siajn konkurantojn*. Li ne devas voli rivali kun tiuj, kiuj devas esti mezurataj per tute *alia* mezurilo ol li.



Li ne devas vidi en la konkurantoj siajn „*malamikojn*“ nur pro tio, ke ili kapablas *superi* lin.

Li esperu la venkon por si nur tie, kie liaj fortoj eltenas la *komparon* kun tiuj, kiuj strebas al la venko samtempe kiel li.

Certe estas pli bone, en *plej malgranda* kadro fari *ion perfektan*, ol konkuri per io neadekvata tie, kie nur maksimumo de propra forto povas esperigi venkon. –

Ĉiu portas en si la potencon, fari *ion perfektan* en agosfero, kiu vere konformas al li.

Ĉiu povas sperti, ke liaj fortoj *plialtiĝas*, se li penas zorge *disvolvi* ilin.

Sed vi devos kalkuli nur kun tio, kio estas *donita* al vi kiel propra „posedaĵo“.

Vi ja povas, en limigita mezuro, *aldone* akiri aliajn aferojn, sed la speco kaj tensio de la fortoj *denaske entenataj* en vi strikte decidas, kio estas adekvata al vi, kaj kio certe devas resti neatingebla al vi.

Vi do ankaŭ en konkurado venos al venko nur tiam, se vi konas *viajn limojn* kaj restas for de la eraro, ke ili povas arbitre *plivastigataj* nur pro via deziro *venki*.

Sed la penado atingi rangon antaŭ la konkurantoj tute ne devas malleviĝi al la ŝtupo de „*batalo*“.

(Mi kompreneble ne parolas pri *tiu* speco de konkurado, kiu povas okazi *nur* en bataloj, ĉar „*batalantoj*“ volas konkuri inter si.)

*Tie ĉi* temu nur pri tiu servo aŭ faro, kiun la *ĉiutaga vivo* ĉie postulas de *ĉiuj*!

Sed in tiu ĉi sfero la „*batalo*“ de konkurenco certe estas *evitebla*.

Mi ja scias, ke ĉe tiuj, kiuj troviĝas en ĝuste tiu batalo, tiu mia parolo kaŭzos nur lacan rideton, – sed mi ankaŭ scias, ke multo povas esti ŝanĝata pli rapide ol multaj homoj kredas, se la *volo* scias ŝanĝi sin...

Ne aŭdace estas aserti ke jam hodiaŭ la plej multaj, kiuj suferas en la „batalo de konkurenco“, batalas *kontraŭvole*, ekkoninte jam antaŭ longe, ke la fortoj, kiujn kostas al ili la batalo, povus esti uzataj *pli bone*. –

Sed ankaŭ tie ĉi la brilanta *fantomo* de la libereco estas rigardata kiel la libereco *mem*, kaj forlogas sennombrajn homojn en nombrodezertojn, kie ili, anime sekigitaj, rigidiĝas kvaŭzaŭ mumioj, al kiuj la tuta ora sablo amasiĝinta sur ilin ne plu povas redoni al ili la liberan vivon de la animo...

Sed *senpotenca* fariĝas la fantomo, tuj kiam oni denove ekkonas, ke nur tie, kie oni lasas al la *animo* ĝiajn rajtojn, *vera libereco* povas disvolviĝi.

Estas *mizere*, kaj certe ne inde je *homo*, se konkuranto pri la favoro de aĉetonto lasas sin kapti de la avideco de l' animalo en si tiugrade, ke li ekonomie pereigas alian konkuranton, aŭ senhonte *streb*as al tiu celo.

Estas *mizere*, se oni konkuras inter si en maniero, kiu ne plu timas uzi la *mensogon*, kuntordante el ĝiaj naŭzaj fadenoj ŝnuregon por *strangoli* alian konkuranton.

Estas *malinde* kaj ankaŭ *malsaĝe*, serĉi propran *sukceson*, kiu fariĝas *atingebla* nur post kiam disfalis *en ruinojn* tio, kion aliaj *antaŭe konstruis*.

Oni eble diros al mi, ke tamen tre konsiderindaj sukcesoj eblis rezulte de tiu agmaniero, kaj ke tio atingita hodiaŭ staras „firme bazita“.

Ankaŭ tio certe ne estas fremda al mi, sed mi tie ĉi kalkulas per aliaj nocioj pri tempo, kaj scias pri sekuraj leĝoj, kies efektiviĝo ordinare ne hastas...

Ne nur la *unuopulo*, kiu je tiu kosto atingis sukceson por si mem aŭ sia parencaro utiliganta ĝin, ne povas eligi sin el tiu efektiviĝo, sed ankaŭ la *prospero de tutaj landoj, tutaj kontinentoj* estas endanĝerigata per lia agado. --

Ne estas la plej malbona afero, se malluma tago ĉe la borsodisbatas tion, kion senanima avideco starigis sur la ruinoj de honeste konstruitaj magazenoj. --

Kie la homa komunumo ne scias *malhelpi* tion, kio *profanas* homan animon, tie la *nepoj* kaj *nepidoj* devos multe „*pagi*“ por tio, pri kio unuopulo iam *kulpiĝis*, eĉ se li *ne* estis ilia *praulo*.

Sed *tiu*, kiu ne *timis* tian teruran kulpon, trovos, eĉ se li ankoraŭ sur la mortlito sentis sin kiel venkinto, *neniun* en la eterneco, kiu kompatus lin, antaŭ ol tie ĉi sur la tero ĉiu *sekvo* de la kulpo *estingiĝis*...

Dia *amo* povas *pardon*i nur tie, kie ankaŭ la *kulpo* estis sekvo de la *amo*.

Ankaŭ tie, kie *animaleca* „*amo*“ igis homon „*kulpiĝi*“, „*Dia amo*“ *senkulpig*os lin, tuj kiam la memkulpigito estis *senŝarĝig*ita de *tiu*, kiu *kunkulpiĝis* pri la sama kulpo.

Sed kie *senrespekta profitemo* forlogis al kulpiĝo, tie nur *propra* senŝarĝigo povas alporti *liberigon* de kulpo.

Sed tiu ligita al sia egoismo *ne* povas liberigi sin de la *sekvo* de siaj agoj, *antaŭ ol elĉerpiĝis* tio, kion li mem *kreis* por *servi* surtere sian fortan inklinon.

Neniam povas esti starigata *apartigata muro* inter la *impulsoj*, kiujn tera homo kreas *en sia ĉiutaga vivo*, kaj iliaj *sekvoj*,

kiuj *efektiviĝas* nur longe post kiam li forpasis el la surtera ekzisto. –

## Sloganoj

Malmulto en la vivo de la homa komunumo kaŭzis tiom da damaĝo kiel la „*slogano*“: – tiu monstro estiĝinta el nepensemo kaj la volo persvadi.

Novajn kaj novajn viktimojn ĝi postulas en ĉiuj sferoj de vivo kaj spertado de tiu ĉi surtera ekzisto.

Sed antaŭ ĉio, ĉiu slogano malhelpas al siaj servutuloj atingi *nedependecon en sia pensado*.

Volonte ĉiu nepensemulo lasas sin *kapti*, se la ĝusta slogana lazo estas ĵetita sur lian kolon, kaj, fariĝinte predo de ties maŝo, li rapide forgesas sian antaŭan liberecon...

Ĉia rezisto rapide ŝanĝiĝas en preskaŭ perversan *servilecon*, kaj fine oni sentas veran volupton ĉiam sekvi la lazo-tiradon, ĝis oni atingas ĉirkaŭbarejon, kiun la sloganistoj preparas por sia kaptaĵo. –

Malofte oni sukcesas eskapi el tia ĉirkaŭfermejo, kaj eĉ la *deziro* fuĝi nur malofte vekiĝas en tiuj enfermitaj.

La plej multaj sentas sin en tre bona „*sekureco*“, kaj ili antaŭ longe perdis ĉian memstarecon en sia pensado.

Sekve ili fariĝas konstanta *danĝero* ankaŭ por tiuj estantaj ankoraŭ *ekster* la ĉirkaŭbarejo, en la sama maniero, kiel malsovaĝigitaj elefantoj estas uzeblaj por kapti ankoraŭ liberajn animalojn de sia speco.

Slogano aŭ frapfrazo povas *ŝajni* ampleksi multon, kiu tute ne estas entenata en ĝia senco, – kaj tio, kion oni sentas

kiel „frapo“, al kiu oni, interne trafita, klinas sin, pleje estas nur la rezulto de *superruzado* de la *nepensemo*. –

Kiom certe la pensado povas fariĝi la plej granda *malamiko* de la homo, tiom necesa ĝi estas por li kiel *armilo* ĉie, kie vortoj celas *senarmigi* lin.

Sed la slogano estas nenio alia ol vorto, kiu celas *senarmigi* per la *paralizado de laŭsensa pensado*.

Ĝi povas venki nur tie, kie neniu kuraĝas *rezisti* al ĝia „frapanta potenco“.

Sed se iu scias *kontraŭi* al ĝi kun maldorma menso, kaj defendeme uzi la armilon de konsekvenca *pensado*, tiam la slogano estas rapide *senigita* je sia potenco, kaj ĝi disfalas kiel stranga misformaĵo.

Tio, kion ĝi celis efektivigi, tiam montriĝas kiel malplena *iluzio*, – kaj nur la preteco *sekvi* tiun iluzion vere estis antaŭe minacanta *danĝero*...

Estas apenaŭ nombreblaj tiuj, kiuj tiun iluzion, kiu scias ŝanĝi sin en *plej diversajn formojn*, devas fidele sekvi, ĉar ili ne defendis sin, kiam la slogano surprize atakis ilin. –

Viroj kaj virinoj, saĝuloj kaj nesaĝuloj, maljunuloj kaj junuloj, stultuloj kaj grandaj inteligentuloj troviĝas en la nemezureble longa procesio de tiuj trompitaj per sloganoj, kaj *novaj kaj novaj* sekvantoj alfluas al ĝi, ĉar nur plej malmultaj homoj kuraĝas uzi la liberan *pensadon*, kiam la ĝusta slogano scias lerte ataki ilin...

Tiu *preteco* sekvi, kiam slogano aperas, alportas netrotakseblan *danĝeron* al la tuta homa vivo.

En multaj okazoj estas neniam kompansebla la damaĝo tiu maniere kaŭzita en grandaj kaj malgrandaj unuiĝoj, kreitaj de homa kunvivado.

Kaj eĉ en la plej malgranda el la unuiĝoj: la ligiĝo de du homoj en *edzeco*, la sloganomanio ofte kaŭzas fortan malfeliĉon. —

La plej eta knabo jam alportas en la familion, kiel donacon de la kunlernantoj, sian sloganon, kiu estas ankoraŭ nekomprenebla al li, — infanoj kaj gepatroj lasas sin trompi kaj fariĝas interbatalantaj partioj, ĉiu el kiuj sekvas alian sloganon.

Sed plej horora fariĝas la danĝero tie, kie *la tuta publika vivo* senreziste lasas sin konduki je la nazo per slogano. —

Tiam la slogano eniĝas tra ĉiu fendo en ĉiun domon kaj malhelpas, ke maldorma defendemo preparu sin al rezisto.

*Tutaj popoloj* povas senhelpe subfali al tiu sloganomanio, triumfigante tiujn, kiuj *ne* lasis pereji sian pensadon, kaj ne ŝparis penon nek cerban devigadon, por atingi majstrecon en la ĵetado de sloganoj...

Kion poste utilas al tiuj grave damaĝitaj, se ili fine *tamen* provas defendi sin kontraŭ sia sklaveco?

Multe tro longe ili antaŭe *mem* uzis sloganojn por manipuli *aliulojn*, ĝis ili trovis siajn majstrojn, kiuj ankoraŭ *pli bone* kapablis ĵeti sloganojn...

Nur la konscia, *plej strikta deturniĝo* de la trompa mondo de sloganoj tie ĉi povas alporti savon. —

Vere estas tempo por tio!

Tro longe oni sekvis la *fantomon* de la libereco, — tro longe oni mem estis en ĝia sorĉo kaj provis trompi per slogano aliulojn, por havigi al si sekvantaron.

Nun oni fine ja devas ekkoni, ke sloganoj neniam povas konduki al *vera libereco*.

Sed oni ankoraŭ estas tiom ligita al sia antaŭa slogana saĝo, ke oni – ankaŭ por *kontraŭi aliulan* uzadon de sloganoj – senvole *subfalas* denove al la sloganoj, kiujn oni iam kreis por ĵeti ilin renkonte al aliuloj...

Tro memcerta aroganteco samtempe havas la tre naivan opinion, ke la kontraŭulo „*ne rimarkos*“, ke oni ĵetas al *lia* slogano nur la *propran*, ĉar oni ne scias defendi sin aliamaniere kontraŭ la atako.

Sed tiuj, kiuj fariĝis *majstroj* de la slogana batalmaniero, ĉar ili *volis* atingi majstrecon, ekkonas tre ekzakte, ke oni renkontas ilin nur per *sloganoj*, kiuj havas *malpli* grandan frapforton ol iliaj propraj...

Tial ili jam anticipe estas certaj pri sia venko, – escepte se iliaj kontraŭuloj ankoraŭ povas decidiĝi *finfine rezigni* la batalilon, kiun ili majstras ja nur *duone*, ĉar ili ne volas troe ŝarĝi sian *konsciencon* pro la fraporto de ilia slogano. – –

*Senkonsciencia* devas esti tiu, kiu volas majstri la sloganon, ĉar kiu ankoraŭ portas konsciencon en si, tiu ne estas kapbla elteni la *ŝarĝitecon*, je kies kosto sola la venko en la batalo per sloganoj fariĝas atingebla. –

Tiuj, kiuj ekkonis, ke la slogano neniam povas konduki al la *libereco*, hodiaŭ povas sukcesi nur tiam, se ili konsekvence *evitas* la sloganon.

*Aliaj* armiloj devas efektiviĝi ilian defendon.

Estonte iliaj vortoj devas esti bone *konsiderataj*, kaj bazu sian efikon nur sur *vero!*

Sed ne *ĉiu* vero taŭgas por efika defendo, ĉar ne ĉiu vero estas tuj *ekkonebla* al la nesperta rigardo. –

Nur tie, kie vero estas *tuj* sentebla, ĝi povas efike *kontraŭi* la eraron, kiun la slogano celas disvastigi.



Kiu finfine, superinte fortajn internajn rezistojn, atingis la ekkonon, ke malantaŭ ĉiuj sloganoj etendiĝas nur la *dezerto*, – kiu scias, ke tie ĉi furiozas la *fantomo* de la libereco en unu el siaj plej teruraj formoj, – tiu certe prenos sur sin la *saman* penon, la *saman* fortostreĉon por trovi la adekvatan, laŭcelan formon de la *vero*, kiel senĉese prenas sur sin tiuj, kiuj akriĝas la *sloganon* ĝis la plej granda akreco. – –

Lia vorto ne devas rezultigi *membriigon*, – ne devas esti banala *konfirmo* de la *propra* opinio.

Li neniam devas forgesi, ke li ankoraŭ parolas al „*mal-amikoj*“, kiuj *fariĝu* al li amikoj per *ekkonado*!

Li devos eviti *atakadon*, kaj agi nur per *defendado*, – per defendado, kiun la kontraŭulo devas *respekti*, eĉ se li eble *restos* kontraŭulo. –

Oni ne povas atendi de tiuj, kiuj sentas sin bone en la sloganomanio, ke ili estas tuj regajneblaj por la *realo*.

Same kiel kuracisto, kiu volas kuraci la vualitan cerbon de *mensa malsanulo*, komence devas *adaptiĝi* al lia frenezo, se tiu, kondiĉe ke li estas ankoraŭ sanigebla, retrovu sin en la realo, – tiel ankaŭ ĉiu, kiu volas eltiri la animon de sia kunhomo el la *sloganomanio*, devos konsideri, ke la trompito ankoraŭ rigardas kiel „*veron*“ tion, kion li forlasu por reveni *al si mem*. – –

La mizerulo, kaptita de la *sugesta forto* de la slogano, ankoraŭ ne estas *kapabla* liberigi sin el la strikte ligantaj katenoj de siaj pensoj.

Li ankoraŭ ne *kuraĝas* fidi sian *propran* kapablon ekkoni.

La slogano tenas lin tro firme, kaj eĉ se li deziras *liberigi* sin, tamen mankas al li la *kuraĝo* sekvi la liberecon *tie*, kie ĝi estas tro malproksima de lia amata slogano. –

Oni povos savi la devojiĝinton en neniu alia maniero ol per bonkora *atentado* de lia eraro, kaj nur se oni montras al li, ke oni *respektas* lin, li fine ja povos vekti en si la *forton*, kiu alportas al li la ekkonon, ke nur *slogano* kondukis lin je la nazo tie, kie li opiniis, ke li libere sekvas bone bazitan *ekkonon*.

## Memprezentado

Ne la plej malbonaj estas tiuj, kiuj deziras esti „*pli*“ ol ili estas laŭ sia aŭ aliula *taksado*.

Tamen la plej multaj el tiuj nekontentaj je si mem imagas „*fatamorganon*“, – tamen ne malmultaj el ili lasas sin forlogi de la *fantomo* de la libereco ĝuste tien, kie ne ekzistas vera libereco por li, tiel ke lia surtera vivo finiĝas en *amareco*, ĉar liaj kunhomoj – laŭ *lia* opinio – ne koncedis al li tion, kion li meritis...

Unu malamas la pozicion, kiun li okupas por gajni sian vivtenon, ĉar li taksas siajn *scion* kaj *povon* pli alte ol la postulon faratan de lia pozicio, – alia iras al sia laboro kun granda malemo, ĉar ĝi ŝajnas al li ne *pagita* tiom alte, kiom li mem taksas ĝin.

Unu ĉiutage plendas kontraŭ sia sorto, ĉar ĝi malebligis al li la *preparan edukadon* necesan, por ke li atingu la sferon de aktiveco, kiu sola ŝajnas adekvata al li, – alia malbenas la tutan homaron, ĉar oni ne donis al li denaske la *terajn posedaĵojn*, kiujn li mem aljuĝus al si, se li havus la potencon por tio.

Ĉiu rigardas *alian* celon kiel perditan por si, – sed ĉiuj konsentas en la forta konvinko, ke ili povus esti „*pli*“ ol ili estas, kaj tiu ĉi konvinko certe *havas bazon*, kvankam en *alia* maniero ol la konvinkitoj opinias.

Vi volas esti „*pli*“ ol vi estas?

Sekve vi „*estas*“ tro malmulte! –

Tro malmulto je vi „*estas*“!

Vi sentas, ke vi povas esti „*pli*“, sed ankaŭ „*malpli*“, ol la grado de prestiĝo, kiun vi povis akiri antaŭ vi mem kaj aliaj.

Vi sentas, ke *multeco* sentas sin en vi, – ke tiu multeco povas *fariĝi* „*pli granda*“ aŭ „*pli malgranda*“. –

Se vi do volas esti „*pli*“ ol vi estas, tiam *fariĝu pli*!

Ne daŭrigu *esti* tiom „*malmulte*“, kiom vi hodiaŭ *estas*!

Ne kontentigu vin per *deziroj*, sed *fariĝu* „*pli*“, ĉar vi *volas* esti „*pli*“!

Ekzistas ankoraŭ multe pli en vi, ol kiom vi aŭdacus suspekti.

El pratempaj tagoj ankoraŭ estas en vi multo, kio vi certe ne plu volas *esti*, kaj vi eĉ devos *detiri* de ĝi vian eston per via tuta forto, se vi ne volas detrui *vin mem* per tio, ke vi detruas *aliulojn*...

Sed *samtempe* estas en vi nedirebla multo, kion vi ĝis nun ankoraŭ *ne* sciis atingi, kaj ĝi ampleksas multon, pri kio vi ankoraŭ ne scias eĉ en viaj plej aŭdacaj revoj! – –

Inter tio, kio vi *ne plu* estu, kaj tio alia, kio vi *ankoraŭ ne* estas, kuŝas tio malmulta, kion vi hodiaŭ prave opinias „*multe tro malmulta*“ por difini vian mem prezentadon...

Estas *la spirita fajrero de Dio*, kiu spertas sin en via propra „*mi*“ kaj vere scias, ke vi povus esti multe „*pli*“, ol vi ĝis nun estas!

Vi do nur enprenas en vian teran konscion tion, kio estas sentata en la *plej internaj* regionoj de via esto.

Sed tie via esto soifas plenumiĝon je ĉio, kio ĝi ankoraŭ *ne estas*!

Tial vi volas esti „pli“ en la formoj de *pasemo*, – tial vi penas fariĝi „pli“ en via *ĉiutaga vivo*, kie dependas sole de la *neceseco*, kio fariĝas atingebla por vi. –

Sed tie ĉi vi povos fariĝi „pli“, ol vi hodiaŭ estas, nur tiam, se vi scias *enpreni* en vin „pli“ en via *esto!*

Vi devas *postuli* de vi pli, se vi volas ricevi pli!

Per klara, memcerta volo vi devas en vi mem *rajte postuli* tion, kio vi volas „*esti*“, – per tiu volo, kiun konas ĉiu sportulo, kiam li scias pri si, ke lia trejnado donas al li certan *rajton* aserti sian „sportan kvaliton“.

Sed, same kiel la sportulo, vi devos fari ĉion necesan por konstante resti „en taŭga stato“, – kaj tio estas ebla al vi, kiel al li, nur per rezignado pri ne malmultaj aferoj, kiuj estas permesblaj al aliaj homoj, sed ne al tiu, kiu volas *fariĝi* „pli“, – eĉ se li jam *estas* „multo“! –

Malantaŭ la deziro esti „pli“ ol „*aliuloj*“ kaŝiĝas nur la impulso esti pli, ol *vi mem* estas, ĉar vi, same kiel la aliuloj, ankoraŭ estas je la *malplej granda* parto tio, kio vi *kapablas* esti! –

Temas pri la uzado de fortoj, kiuj estas ĉiam libere atingeblaj senescepte al *ĉiuj* homoj de tiu ĉi tero.

Sed tiujn „*animajn fortojn*“ aŭ animoelementojn povas „uzi“ neniuj homoj, kiu ankoraŭ ne sciis *unuigi* ilin al sia propra esto.

Oni devas *mem fariĝi* la anima forto, kiun oni volas uzi kaj per kiu oni volas difini sian memprezentadon!

Ankaŭ pri *malaltaj* fortoj en vi vi povas disponi nur tiam, se ili plenigas vian *eston* kaj per tio fariĝis identaj kun vi.

Nur tio, kio vi mem „*estas*“, *servas* al vi, – t.e. *apartenas* al vi kaj *obeas* vian volon.

Tiom malmulte kiel vi povas atingi *Dion*, escepte se Li mem *unuigis* sin al via propra esto, – tiom malmulte vi povas agadi per *animoelemento*, kiun vi mem ne *unuigis* al via *esto*.

Sed vi certe ne volu procedi tie ĉi *skemece*, komencante kvazaŭ alvoki unuope la animoelementojn, kiuj ekde nun plenu vian eston!

Vi ne devas subtaksi la ekigan potencon, kiu ĉiam vekigas por agado, kiam vi staras antaŭ io sole *suspektata!* – –

*Respektu* en vi ankaŭ tion, kio ankoraŭ *kaŝas* sin al vi!

Se vi volas iam unuigi al vi altajn animoelementojn, kiuj ankoraŭ ne fariĝis vivaj en via esto, – kiuj do vi ankoraŭ ne „*estas*“, – vi devas nur teni kaj sekvi vian ĝeneralan *celdirekton!*

Ankaŭ inter krimuloj ekzistas kelkaj, kiuj estas „pli“ ol aliaj, – sed ilia celado direktiĝas al la abisma profundo de animalca *antaŭhomeco* sur tiu ĉi tero, dum *via* alta celo estas *la eterna spirita homo*, en kiu vi volas iam, post la konstanta luktado kun vi mem en tiu ĉi surtera vivo, trovi vin unuigita kun ĉiuj naskiĝintaj en la spirito. –

Se vi konstante direktas la okulojn al la *celo*, tiam vi povos sekure paŝi antaŭen, sen zorgo kaj sen timo!

Vi tiam unuigos al vi, dum *via* surtera vivo, pli kaj pli de la animoelementoj, kiujn vi iam bezonas por *via* plej alta ascendo!

Sed ju pli vi plenigas vin mem en *via* esto per altaj animoelementoj, des pli facile vi ekkonos, ke vi povas libere fari vian mem prezentadon sur *ĉiuj* sociaj ŝtupoj de tiu ĉi surtera vivo!

*Neniu* homa profesio estas tiom malgrava, ke ĝi ne tolerus *vastefikan memprezentadon* de homo, kiu sukcesis unuigi al si multon!

En *ĉiu* profesio, – en *ĉiu* pozicio, kiun neceseco nuntempe havas por prezenti al vi, – vi povas *esti* multe „pli“, ol vi eble *ŝajnas!*

Sed vi ne devos miri, se vi baldaŭ rimarkas, ke ankaŭ la *aliaj* ekkonas vian riĉan *eston* kaj tiam taksas vin sole laŭ la *radia fortego* de *ties* abundeco, kia ajn estas la socia valoro de la pozicio, kiun vi okupas sur tiu ĉi tero. – –

Vi tiam fariĝis *vere* „pli“ ol la aliaj, kaj vi servos al aliuloj kiel instigo fariĝi „pli“, ol ili tiumomente estas, – same kiel homo, kiu foriris por elfosi oron kaj revenis riĉa, vekos en aliuloj la volon fari la samon.

Erarante, ĉar vi opiniis vian nekontentecon bazita sole en la *ekstero*, vi ĝis nun ĉiam provis nur ion *vanan*, por kontentigi vian impulson *esti* „pli“ ol kio vi *estas*.

Sed tiu kontentigo tute ne restos rifuzita al vi, se vi nun transmetas vian strebadon en *vian internon!*

Tie ĉi, kie vi mem prezentas multecon, kiu povas *pliiĝi* aŭ *malpliiĝi*, – tie ĉi neniu ekstera potenco malvastigos vian *liberecon*, kaj kiam vi fariĝis *vere* „pli“, ol vi ĝis tiu ĉi tago povis fariĝi, tiam ankaŭ via *memprezentado* en la *ekstera mondo* plenigos vin per *sento de feliĉo* kaj interna *kontenteco*.

Nur kiam vi scias prezenti ĉion, kio en vi estas kaŝita por ke ĝi *perfektiĝu* en vi, – nur tiam vi atingis *vin mem* kaj vere venis *al vi!* –

En via *memprezentado* vi kreas al vi la *eterne* daŭranta konscioformo, kiun vi sopiras en viaj plej kaŝaj kaj plej internaj petoj al via sorto...

Sed *vi sola* estas la *formanto* de via sorto, – kaj kiel vi devas surtere elteni tion, kion vi destinis por vi antaŭ via falo en la *teran* konscion, tiel same vi *post via lasta spiro* retrovos vin nur en la *de vi mem* kreita formo de memkonscio: – via memprezentado. – –



# Religio

En Azio, la patrina sino de Eŭropo kaj la profundo de ĉiuj grandaj religioj, kaŝe fluas kvieta fonto, nutranta *ĉiun veran religian* sentadon, kiu iam ĝermis kaj kreskis en la tera homaro, same kiel ĉion, kio nuntempe ankoraŭ kapablas trapuŝi la kruston de materie ligita pensado.

Ankaŭ en la plej fora estonteco la *sama* sentado prenos nutraĵon el la *sama* fonto.

Kiel estas nenie perceptebla tio, kio donas al la vivo ĝian *ĝermoforton*, kaj ĝermoforto tamen montriĝas per tio, kio elkreskas el ĝi, tiel same tiu fonto de ĉiu vera religia sentado montriĝas nur en sia *efiko*, kaj nur rare *ĝi mem* malkaŝiĝas al raruloj.

Ĝis hodiaŭ plej ridinda sorĉa fabelo iras tra la lando kaj trovas kredantojn, kiuj devas esti vere „inda“ je ĝi, sed la miraklomajstroj en tro ekkonebla vesto, kiuj multvorte esprimas sin en tiaj „*fabellibroj por la tro multaj*“, vivas nur en la negoce lertaj kapoj de siaj kreintoj, kiuj neniam avaras la akcesoraĵojn de sorĉado.

*Vera* majstreco pri ekkonado tiom malsimilas la romane-cajn formitaĵojn de tiuj spekulantoj pri la legemo de mirakloaviduloj, ke ekzistas nenia kompara bazo, eĉ se la agemaj inventintoj de mirindaj majstrofabeloj „pruntis“ materialon el ĉie alireblaj fremdaj skriboj, kiam estis necese dispeli la eble ekscititan suspekton de naive kredantaj personoj.

Vere ne estas plezuriga penso, ke ankoraŭ en tiu ĉi tempo – meze de la agada moviĝado en la moderna mondo – tro-

viĝas ne malmultaj homoj, kies cerboj sen ia rezisto toleras la sendignan imagon, ke *la lumo de la eterneco* malkaŝas sin en fakirmirakloj kaj sekretaj artoj, kiujn plejbonaokaze oni povus koncedi al la magiisto en malnova sorĉa opero. –

Mi devas disŝiri tiujn embarase strangajn florojn de kermesa romaneco, por ke oni ne povu *misuzi* tion, kion mi nun havos por diri, misuzi per tio, ke oni faras al si el miaj vortoj apogilojn por iu ajn erara, konfuza opinio.

Ni homoj sur tiu ĉi tero tute ne vivas *nur* nian individuan vivon, sed estas, en nia profunda interno, *interligitaj* kun *ĉiuj* pensante konsciaj estaĵoj, ne nur kun tiuj vivantaj sur tiu ĉi terglobo.

Kvankam tiu kosma interligiteco efikas en ni en konsiderinda grado, tamen ĝia efiko estas multe *superata* de la efika forto de la *surtera* vivo de pense konsciaj estaĵoj, en kiun ni tie ĉi estas enteksitaj.

Sed *multe pli sekvoriĉa* ol *kosma* kaj *tera interligiteco* estas por la unuopulo la *grupo* akre limigita per *parenceco laŭ impulsoj*, al kiu li anime apartenas. –

Al ĝiaj nevideblaj influoj li estas elmetita *seninterrompe*, same kiel ĉiuj apartenantaj al la *sama* grupo estas konstante influataj de *lia* efiko. – –

Povas esti forte ligitaj kun tia „*grupo*“ homoj, kiuj neniam dum tiu ĉi tera vivo renkontiĝos, scias nenion unu pri la alia en la ekstera vivo, ne havas komunan lingvon, kaj pasigis sian infanaĝon en tute diferencaj kultursferoj. – –

Ĉiuj malproksimecoj estas superpontataj en la grupoj de impulsparencoj.

Distanco ne prezentas obstaklon por la reciproka influado de la grupanoj...

Kiel elektraĵ ondoj hodiaŭ etendiĝas ĉirkaŭ la tuta terglobo kaj tamen estas riceveblaj nur per antenoj, kiuj estas aranĝitaj por la sama „ondolongo“, tiel same nevideblaj fortoj eliras ankaŭ el ĉiu tera homo kaj plej sekure interligas la membrojn de ĉiu grupo de impulsparencoj, sen fariĝi percepteblaj al aliaj grupoj.

Estas indiferece, en kiu loko de la tero vi troviĝas: – vi ĉiuokaze estas tie atingata de *ĉiuj* influoj de *via grupo*, indiferece, ĉu tiuj tiel ligitaj kun vi vivas en via aŭ iu ajn alia kontinento.

Vi ankaŭ tute ne havas la potencon *ĉesigi* la tiel kreitan interligon, – escepte se vi *ŝanĝas* la impulsojn, kiujn vi kutime sekvas, tiel ke vi „aŭtomate“ ligas vin kun alia grupo. –

Estante *tre diferencaj* laŭ *amplekso* kaj *speco*, multaj miloj de tiaj animgrupoj nevideble interligitaj penetras la tutan homaran ekziston sur la tero, – *ligante* homojn space fore *apartigatajn*, sed ankaŭ ofte *apartigante* homojn space *plej proksimajn* unu al la alia...

Ne suspektante, vi partoprenas en *ĉio*, kio okazas en ĉiu animo, kiu sin spertas en *via grupo* de impulsparencoj. – –

Vi opinias, ke vi perceptas en vi nur *propran* animan moviĝon, kaj tamen vi estas movata, pli ol vi povus supozi, de anima okazado nuntempe spertata en iu homo *apartenanta al via grupo*, tiel same, kiel ankaŭ *via* anima spertado ĉiutempe fariĝas sentebla al *ĉiuj* viaj impulsparencoj. – –

Tio, kion mi tie ĉi volas komprenigi al vi, povas klarigi al vi multon, kiu ofte, kaj ĝis la hodiaŭa tago, prezentis al vi „enigmon“ ...

Vi nun havas enrigardon en la *internan strukturon* de la *formoj* de anima interligiteco, kaj samtempe scias, ke vi povas

*decidi*, kio influu vin plej forte en via anima spertado, – ĉar se *vi mem* apartigas vin disde la impulsoj, kiuj ŝajnas al vi *nedezirataj*, veninte al vi *kiel influo de impulsparencoj*, tiam vi foriĝas el la grupo, al kiu vi ĵus ankoraŭ apartenis, kaj tuj trovas vin ligita al *alia* grupo, kiu konformas al tio, kion vi *nun* portas en vi. – –

*Respondecon* por via tuta pensado, parolado aŭ agado portas *nur vi sola*, eĉ se la impulsoj decidigantaj vin estis, nevideble kaj nerimarkite, perataj al vi fare de *alia* flanko.

La impulsparencoj de via anima grupo, kiuj estas influataj de *vi*, sen eĉ suspekti tion, samamaniere portas la respondecon por *sia* kondutado.

Vi nun facile povas diri al vi, ke la miloble diversaj animgrupoj aranĝiĝas en miloj da diferencaj *ŝtupoj de spertado* unu super la alia, kaj ke vi povas veni al *pli alta* spertado de via animo nur tiam, se vi mem nelacigeble decidigas vin forlasi la malaltajn impulsojn kaj elekti kaj efektiviĝi en vi ĉiam *pli altajn*. –

Eble vi nun komprenos, kion mi diris pri la kvieta „*fonto*“, kiu ankoraŭ nun, kiel antaŭ jarmiloj, nutras, el la prafundo de ĉiuj spirite vivigitaj religioj, la *veran religian sentadon* de la tera homaro, – indiferente, el *kiu* formo de imagado tiu sentado ĝermas. – –

Eble vi nun komprenos, ke mi devis plej klare averti kontraŭ la kreitaĵoj de fantaziado saturita de superstiĉo. –

Eble vi jam nun ankaŭ ekkonas, ke mi parolas pri „*fonto*“, kies akvoj fontas el la *plejinterno* de la *vivo*, kaj ke tie ĉi estas la parolo pri nenio alia, ol la *plej alta* kaj samtempe *plej malgranda* animgrupo de teraj impulsparencoj, kiu etendiĝas en la lumregionon de *pracerta esto*, – ĉar tiu grupo jam estis konscia en ĝi, longe antaŭ ol ĝi ricevis *teran* konscion. – –

Vi certe ankaŭ komprenos, ke ĝia influo povas atingi nur *tiujn*, kiuj sopiras la lumon, – indiferente, sur *kiu* ŝtupo staras la grupo de impulsparencoj, al kiu ili apartenas. –

La malmulto da lumantoj povas perceptebligi sin al la aliaj grupoj ne per la pli granda impulsparenceco, kiu ligas ilin *inter si*, sed sole nur surbaze de la *ĝenerala* interna interligiteco de *ĉiuj* teraj homoj, – kaj bone kompreneble estos al vi, ke ankaŭ tie ili povas proksimiĝi nur al tiuj animoj, kiujn la tuta propra strebado jam kondukas *supren*.

Tie ĉi temas pri *io plej interna*, kaj neniu scivolemo, neniu speco de soifo je scio, neniu potenco de la tero povas tie ĉi ekvidi *pli*, ol tion, kio alfluas al la *animo*, kiu preparas sin mem por ricevi la *spiritajn* „ondojn“, kiuj senĉese fluegas el tiu grupo de lumantoj al ĉiuj iliaj kunhomoj sur la tero. –

Sennombraj estas jam *ligitaj* kun tiu lumorondo, eĉ se ili *interpretas* tion, kio atingas ilin, laŭ la maniero de siaj kutimaj kredinstruoj.

La „fonto“ tie ĉi fluanta povas plenigi *ĉiun* formon, kiun spirite vivigita kredo kreis, – kaj *ĉiu* inda vazo estas rigardata kiel meritanta enpreni, kion ĝi povas „ekkapti“...

Nur la vazoj *plenaj* de tera ŝlimo estas *nekapablaj* ricevi, same kiel la „kribriroj“, kiuj povas *konservi* nenion en si mem.

Sed viaj *kredinstruoj* certe *ne* malhelpos vin, kaj via *konfeso* povas nur plivastigi vian *kapablon enpreni* tion vivan, kio estu tie ĉi enprenata...

Sed vi devos scii konfesi per la *koro*, kaj via kredo ne devas esti nur *cerbobazita aroganteco*.

Ekzamenu vian kredon *ĝisfunde* kaj eltrovu, ĉu ĝi povas radikiĝi ankaŭ en via *animo*.

Se ĝi estas tiele bazita kaj viva, tiam la lumtrafluitaj akvoj de maldorma scio certe neniam damaĝos ĝin, sed anstataŭe igos ĝin *ekflori* kaj tiam *frukti*. – –

Sed vi devos zorge *elradikigi* ĉiun *superstiĉon*, ĉar ĝi *rabas* – por nutri sin – al via kredo ĉiun forton, el kiu tiu kredo disvolviĝu. –

Tamen vi tie ĉi ne devas konfuzi *nuran ŝercon* kaj *sendanĝeran malnovan kutimon de prauloj* kun *senbrida superstiĉo*, kiu volas *superkreski la animon*. –

Eĉ malpli vi provu neniigi la formojn de *malnova kredo*, kiuj nur fariĝis „fremdaj“ al vi, ĉar ili entenas simbolojn, kiujn vi ne plu *povas interpreti*.

Nur *malsaĝeco* elsarkas el la grundo ĉion, kion ĝi ne ekonas, kaj distretas, kion ĝi ne povas utiligi.

Ankaŭ religio povas disvolviĝi nur en vera *libereco*, kvankam la vojoj pleje estas *antaŭdeciditaj* de antaŭ longa tempo, vojoj, en kiuj solaj la diversaj formitaĵoj de religia formemo povas montriĝi *moviĝemaj* kaj *kiel vivoformantoj*.

Tiel ankaŭ religio certe povas *konduki* al vera libereco kaj *sekurigi* al vi vian liberecon. –

Profunde bazita en *neceseco* estas la multobla *diverseco* de la instruoj kaj kultoj.

Estas nur *memtrompo*, se oni pensas, ke la diverseco de *religia sentado* estas forigita per tio, ke oni disvastigis en kelkaj landoj la formojn de *unu sola* instruo kaj la formojn de *ties* kulto. –

*Vortoj* certe povas trovi siajn „*servantojn*“ en *ĉiuj* lokoj, kaj simboloj postulantaj nur *abstraktan* kaptadon certe povas esti interpretataj de *ĉiuj* popoloj en la *sama* maniero.

Sed la *religia sentado* – malgraŭ la ekstera egaleco atingita en la formo de konfesio kaj kulto – ĉiam preparos al si el anima certeco la *proprajn* vojojn, kiuj laŭ *neceseco* konformas al *ĝia aparta naturo*.

Laŭ la *ekstera* impreso, ŝajnas regi en *multaj* landoj la sama religio, ĉar oni uzas la *saman kulton* kaj sonigas la *samajn vortojn*, – sed *interne* daŭre restas tio, kio ekzistis jam antaŭ jarmiloj kaj *neniam* estas forigebla, ĉar ĝi firme radikas en *pli profundaj* profundoj ol la *instruo* eble al ĝi „anime fremda“ kaj *ĝia kulto*. – –

*Ne* temis, kiel la homoj de hodiaŭ opinias, pri malsaĝa „idolservo“, se antikvaj popoloj honoris siajn *landodiojn*. –

Ili sciis, ke tiel *io reala* estis atingebla, kaj tio *sama* reala estas atingata ankoraŭ hodiaŭ en multaj lokoj de tiu ĉi mondo, kvankam la homa imago kreis al si aliajn *bildojn* por kapti ĝin kaj la ekstera kredo trovis novajn *nomojn* por la potencoj kaŝitaj al ĝi. – –

Tre malmulte gravas, kio estas skribita pri la legenda „*heroo*“ de popolo, kaj kio la legendo scias pri la „*sanktulo de la loko*“.

*Heroo* aŭ *sanktulo* estas „vero“ nur kiel *bildo de la imago*, kaj *malantaŭ* tiu bildo staras la spiritogenerita *realo*, por kiu estas tute malgrave, ĉu ĝi fariĝas kaptebla al la tera homo per *tiu* aŭ *alia* bildo, – ĉu oni konstruas altarojn al *tio Dia* en ĝi, aŭ honoras la spiritan *homon* en ĝi kaj konsekras al li, kiel „sankta patrono“, la preĝejoj de la lando. – –

Tial estas *ne* ĉiam ĝuste, „*purigi*“ religion forigante el ĝi ĉiujn formitaĵojn ankoraŭ vivajn, kiuj ŝuldas sian ekziston al *pratempa religio*. –

Malnova bildo, kiu estas apenaŭ ekkonebla sub kandela fulgo kaj preĝeja polvo, devas esti purigata nur per la mano

de *kompetentulo*, se ĝi fariĝu ekkonebla en sia origina beleco. Tiel same, oni bezonas *pli* ol nur la impulson al *racia klareco*, se oni volas „*purigi*“ religion de tio, kio minacas detrui ĝian klaran vizaĝon...

Tro alta estas la kosto de „*purigado*“ de la instruo, se samtempe oni malsaĝe forigas „*signojn*“, kiujn oni iam poste devas grandpene *reenmeti* en la bildon de la instruo, se ĝi parolu ankaŭ al tiuj, kiuj tiam denove scias *interpreti* tion, kio al intertempo ne estis interpretebla. – –

Sed pli alte ol la instruo staras la *vivo!*

Nur en via *ĉiutaga vivo* povas montriĝi, ĉu la instruo, al kiu via koro estas ligita, kondukas vin renkonte al *vera libereco*, aŭ ĉu vi estas sklavo de instruo, kiu *blindigas* vin, por ke vi ne vidu, ke estas nur *fantomo* tio, kion ĝi montras al vi kiel „liberecon“. – –

„La sabato estiĝis *por la homo*, kaj ne la homo por la sabato.“

Nur se la instruo eniras en la *vivon*, ĝi povas *montri sian taŭgecon!*

Instruo, kiu ankriĝas nur en la *intelekto*, estas apenaŭ pli ol ĉiu *parkera* scio, kiu havas valoron nur tiam, se oni „*atribuas*“ al ĝi valoron. –

Tiom longe, dum via vivo ankoraŭ ne estas „*penetrita*“ de religio, vi ankoraŭ ne scias *utiligi* vian konfesion! –

Nur tiam religio „*vivas*“ en vi, se ĝi konstante *ĉeestas* en via menso, ekde la unua momento de vekiĝo ĝis la lasta klara mementado, kiun tiam la dormo vualas!

Nur tiam, se *ĉiu* okazado dum la tago estas *superbrilata* de via *religia sentado*, – indiferente, en kiu *formo* vi flegas



ĝin , – vi povas esti certa, ke vi konformas al tio „eterna“ en vi! – –

*Antaŭe* vi mem estas nur *malhelpaĵo* por via *animo*, ĉar vi malhelpas ĝin efikadi *en tiu ĉi tera vivo!* –

*Antaŭe* vi estas konscia pri vi mem nur *animalece*, eĉ se vi *opinias*, ke vi ekkonas vin spirite! –

Eĉ se la tuta mondo honoras vin kiel iun el siaj granduloj, vi tamen en la spirito estas subordigita al la plej malgranda homo, kiu scias mergi sian ĉiutagan laboron en la fortoplenajn radiojn de *vera religia sentado*, por tiumaniere prezenti al sia *animo* novan *nutraĵon* per ĉio, kion li faras! – –

El *tiu* interna *penetrado* de ĉiu laboro per *religio* iam naskiĝis *ĉiu* el la kulturoj sur tiu ĉi tero, kiujn vi hodiaŭ alte admiras kaj opinias apenaŭ plu atingeblaj...

Ankaŭ *nia* tempo postulas novan *mondkulturon*, – sed ĝi celas nur „*konstrukcii*“ kulturon, same kiel oni konstruicias feran ponton...

Sed tiu ĉi tempo povos „*naski*“ el si *kulturon* nur tiam, se ĝi scias ree *penetri* sin per *vera religia sentado!* – –

Sed *vi*, kiu mem, kiel „*infano de la tempo*“, hodiaŭ estas en ekzisto sur la tero, – komencu *ĉe vi mem!* –

Kiam vi *mem mergis* vian ekziston en *religion*, tiam vi baldaŭ konstante renkontos *aliulojn*, kiuj volas ree fariĝi, el nuraj teraj animaloj, *homoj unuigitaj kun la spirito...*

Tiam *via vivo* estos al *ili* plej bona instruo, – kaj malmulto da vortoj estos bezonata por *konfirmi* tiun instruon. –

Kvankam oni eble kredas al viaj vortoj, oni multe pli kredas al via *agado*.

Kiel vi scias montri *per via vivo*, kio plenigas vin en via plejinterno, tiel la aliuloj povos *sperti* ĝin laŭ via *ekzemplo*.

Sed vi certe ne estu „ĝojestingulo“ tie, kie aliaj celas ĝui la malabundajn *ĝojojn* de sia surtera vivo, – kaj vi ne indignu kiel „bigotulo“, kun ĉielen turnitaj okuloj, pri ĉiu naiva, sendanĝera petolaĵo de ĝojantoj.

Se via ĉiutaga vivo *vere* estas decide influita de la religio konforma al vi, tiam vi certe scios ankaŭ *ridi* tie, kie eblas senkulpe ridi.

Tiam vi baldaŭ ekscios, ke gaja vorto ja povas havi pli bonan efikon ol ĉiu malgajhumora, tro serioza admono aŭ instruo.

Vera religio estas gaja *libereco!*

Tial malfidu ĉion, kio deziras esti rigardata kiel „religia“ sentado, sen montriĝi *konfirmita* per la *serena gajeco de la koro!* – –

# Scienco

La mondsaga *patrino* de ĉia *ekkono* estas la *lingvo*.

Sed longa estis la vojo de la lalaanta sonbojado, kiu iam servis al niaj animalecaj prauloj kiel *interkomprenilo* por ilia plej povra intelekto, ĝis la unua spiritgenerita *vorto*.

Nura sonado de la voĉo ne povis fariĝi „*lingvo*“, antaŭ ol la cerboj de la prahomanimaloj estis fariĝintaj sufiĉe impresblaj por *transformi* en si la pluvon da eretoj de *fizika* lumo, kiu pluvo ĉie ĵetiĝis sur ilin, en *fortojn de ekkonado*, kiuj povas ĉirkaŭpreni ankaŭ *ion nepalpeblan*.

Ne estas sole nur lingva *komparoj*, kiam oni parolas pri la „*lumo*“ de la *intelekto*, de la *prudento*, de la *pensado*, kaj pri la „*lumo*“ de la *spirito*. –

Kio fariĝas perceptebla al ni per la korpa *okulo* kiel la *fizika* lumo de la *suno* kaj de la *steloj*, – kaj la suna radiado reflektita malpli intense de la luno, – ĉio tio *samtempe* estas *spirita* substanco, kiu ja restas *neperceptebla* al la nemalfermiĝinta cerbo de la aliaj animaloj, sed kiun la jam sentema cerbo de la terhoma animalo *enprenas* kaj *transformas* en *forton*, el kiu la *animo* kreas al si sian internan regnon de *ekkonado*. – –

Eĉ en nia *ekstera ekzistado* ni povus kompreni apenaŭ pli multe ol la plej evoluintaj el la nuraj *animaloj* de tiu ĉi tero, se la *animo* ne povus krei al si, el pura transformita *lumforto*, mense uzeblajn *bildojn* de ĉiuj eksteraj aferoj. –

Nur helpe de tiuj „*bildoj*“ de eksteraj formitaĵoj ni povas „*komprenigi*“ al ni tion, kion niaj kunanimaloj, – eĉ se ili

atingis la plej altan ŝtupon de animala evoluo, – *neniam komprenas* laŭ la sense neekkoneblaj interligitecoj.

Sed „*pensado*“, kies objektoj estas ne plu reflektajtoj de *eksteraj* formitaĵoj, sed *nia propra interna kreaĵo*, estus tiom pli certe neebla, se ni ne disponus riĉan abundon de la transformita substanco de fizika *lumo* en nia cerbo.

Ĉiu „*imago*“, kiu formiĝas en la interna vivo de tera homo, – ĉiu *penso*, kiun homo povas formi, – estas nur *bildo* el *transformita fizika lumsubstanco*, kaj nur en tiumaniere estigita „*precipitaĵo*“ povas la anima kaj spiritsubstanca *realo* fariĝi kaptebla al ni tie ĉi surtere.

La *laŭsona prezento* de tiuj internaj bildoj estas la *lingvo*, kies specifa naturo dependas de la vivoritmo de ĉiu unuopa popolo.

El tiu cerbe *transformita lumsubstanco*, – kiu senĉese *penetras*, en ondoj de *neimageble malgrandaj fizikaj eretoj da lumforto*, ĉion materian, – estas estigeblaj la plej diversaj formaĵoj, kiuj tute ne devas respondi al io *reala*, ĉu, laŭ la ĝenerala lingvouzo, io reala de la *ekstera mondo*, aŭ tio *absolute reala*, kiu havas sian estopotencon nur en *animaj kaj spirit-substancaj formoj*. –

Tial la sperto igis la penskonscian teran homon ekkoni jam en antikva tempo, ke la interna kapablo formi bildojn devas tenata en *strikta disciplino*, por ke ĝi alportu al la ekkonado ion vere *reala*.

*Miskonkludo* aŭ *malĝusta juĝo* ĉiutempe estis la sekvo de senzorga interna bildformado.

Sed necesis la memkontrolo de sennombraj unuopuloj en longaj vicoj de generacioj, por atingi la *certecon*, *kiuj* el la metodoj de formado de internaj formoj devas esti definitive

*eliminataj*, se la *rezulto* de pensado kaj konkludado konduku al la *sekura* ekkonado de aferoj en la kampo de *pruvado de la realo*.

Nur tiumaniere estiĝis tio, kion oni povas prave nomi „*scienco*“.

Sed ĉar tiu strikta *memdisciplino*, kiun oni tie ĉi trovis bazita en *neceseco*, detruis iun aŭ alian karan *iluzion*, ne povis manki memtrompitoj, kiuj *ne* estis pretaj rezigni pri sia speco de *senbrida* bildformado, kaj tial oni povas ĉie renkonti la trompiĝon, kiu opinias sin leviĝinta *alte super* ĉia strikta scienceco.

Oni sentas la „*liberecon*“ de sia pensado minacata de la scienco, kaj ne rimarkas, ke oni sekvas la *fantomon* de la libereco, ĉar oni deziras eligi sin el la *neceseco*, kiu devas ordigi ankaŭ ĉiun internan formadon, se ĝi rezultigu bildon de la *realo*...

Certe, kelkaj servantoj de la „ekzakta“ scienco estas nur povraj „*ĉaristoj*“, kiuj ne povas *rigardi trans* la ŝarĝon de sia malgranda ĉaro.

Certe, laŭdira „scienco“ ankaŭ devas fojfoje kovri vantan *arogantecon*.

Sed se ilo estas *malbone manipulata*, tio tute ne pravas, ke ĝi ne *taŭgas* por bona laborado!

Estas *malsaĝo*, se oni pensas, ke vera *religia sentado* estas *minacata* de la logikeco de la scienco, – kaj nur *malsaĝo* opinias, ke la vojo al plej alta *spirita* ekkonado estas barita al vera scienco, nur pro tio, ke hodiaŭ la persono science pensanta ankoraŭ ne kuraĝas, pro *memgardemo*, eniri en regionojn, kiujn oni ne povas „science“ penetri, antaŭ ol oni *malfermis* ilin al si per propra *spertado*. – –

*Nescience* estus, konkludi, ke scienculoj neniam povus decidi serĉi en si *eblojn de spirita spertado*, nur pro tio, ke hodiaŭ la plej multaj ankoraŭ opinias kvazaŭ *superstiĉa* ĉion, kion oni ne povas *elpensi*, ĉar ĝi devas esti *spertata*...

Sed kiu praktikas sciencon en maniero, kiu fremdigas lin al la maldorma *vivo*, al kiu sola la pensado devus *servi*, tiu estas la *malsaĝulo de siaj revoj* en la sama maniero, kiel iu ajn obsedito de la ĥimeroj de konfuzaj, frenezaj ideoj.

Ĉiu homa agado devas servi al la *vivo*, devas celi *pliriĉigi* la surteran ekziston, se la homo ne fariĝu *sklavo* tie, kie li provas starigi *regadon*!

Ĉar ĉiu scienco nutras sin el la *lingvo*, kiu siaflanke estas nur laŭsona *prezento* de la interna formado de transformita fizika lumforto, ankaŭ *sciencia disvolviĝo* dependas en tre alta grado de la *eldemandado* de la *lingvo*. –

Tro malmulte oni praktikas tiun „eldemandadon“, kvankam ĝi devus esti jam de longe konata kiel la plej fidinda instrumento por akiri novajn intuiciojn...

Ne ĉiu ekkono rezultas el la agadmaniero de la ekzaminendaj substancoj en retortoj kaj vazoj, aŭ malfermiĝas sole al konstanta observado.

Plej gravaj aferoj estis malkovrataj, ĉar *unu vorto* vekis la *person*, kiu *sciis*, kie la ekkono serĉata de multaj kaŝiĝis. –

Ankoraŭ multo estos trovebla, al kio la *lingvo* montros la vojojn al tiu, kiu scias „*eldemandi*“ ĝin en ĝusta maniero.

En tiu ĉi tera vivo ekzistas simple nenia ekkono, al kiu la ĝusta alirejo ne estus eksciebla el la *lingvo*.

Eĉ se ni pensas, ke ni okupiĝas *pri la aferoj mem*, tamen estas nur la *internaj bildoj* kreitaj el transformita lumforto, ki-

ujn ni disponas kiel objektojn de observado, kaj ilian laŭsonan *prezenton* ni tiam posedas en la *lingvo*.

Vi opinias, ke via ekstera okulo ja *vidas* la aferojn kaj perceptas eĉ la plej fajnajn detalojn de ilia surfaco?

Sed via „*vidado*“ estas nur *koncentrita* transformado de la lumeretoj en la *formsubstancon*, el kiu konsistas via tuta „*interna mondo*“, en kiu *sola* vi *reale* vivas, eĉ se vi pensas, ke vi vivas nur en la *ekstera mondo*.

La „lenso“ de via okulo ĉiam kolektas, el la amaso da lumeretoj ĉirkaŭanta vin, neindikeblan *multoblon* de tio, kio eĉ *sen* ĝi atingus la registrajn membranojn de la cerbo, – sed ĝi sendas tiun kolektaĵon en *koncentrita formo* tuj al la „retino“, kiu estas sistemo de „*rastrumoj*“ kaj kvazaŭ aŭtomate plue kondukas ĉiun fizikan lumereton, tuj transformitan en *formsubstancon*, tien, kie la interna *bildo* de la ekstera formo *bezonas* ĝin. – –

Vi do vivas nur en nekompreneble riĉa, ofte ŝanĝiĝanta mondo de internaj „*bildoj*“, kaj nur kiel *sekvon* de tiu ĉiam viva interna mondo vi ricevas viajn tutajn *sentadon kaj pensadon!* – –

„Scienco“ estas nenio alia ol la preteco enpreni la *ordon*, difinitan laŭ *neceseco*, de interna bildformado, samtempe detenante sin de la enprenado de *arbitre formitaj bildoj*.

Ĉiu, por kiu la strebado al ekkono signifas ne nur *ludo*, jam praktikas por si mem „*sciencon*“, eĉ se lia lernita scio estas nur malgranda kaj ne la frukto de altaj lernejoj.

*Deturni sin* de science strikta pensado tie, kie temas pri la ekkonado de interligitecoj en la *ekstera mondo*, signifas *mem-*

*volitan trompiĝon*, mempreparitan *trompon* de la propra *volo ekkoni!*

Sed kie temas pri rezultoj de ekkonado, kiuj estas akireblaj nur en *spertado*, en *travivado*, tie la science strikte regulita procedo de logika pensado estos por tiu, kiu scias *regi* ĝin ankaŭ kiel *spertanto* de *tio supertereca*, ĉiam bonvena kontrolo por la propra certeco de *spertado*.

Kio laste ne povas sukcese rezisti al la trejnita logika pensado, tiel kiel la scienco strikte postulas de siaj servantoj, tio certe ankaŭ ne estas bazita en *spertado*, kaj povas nur dum limigita tempo trompe montri *ŝajnan bildon* de reala ekkono al *tiuj*, kiuj prefere *volas* lasi trompri sin, ol atribui al la por ili timiga „*scienco*“ la altan pozicion en la terhomara strebado al ekkono, kiu tie ĉi sendube decas al tiu malfacile atingita disciplino de pensado.

Ne estas tre ĝojjige, ke oni devas ankoraŭ solene *atesti* tiun banalan veron, sed tio estas bedaŭrinde tre *necesa* pro tiuj multaj blinde sekvantaj la konfuzajn entuziasmulojn, al kiuj ĉiu „lernita scio“ ŝajnas tre suspekta tial, ke ĝi baziĝas sur premisoj, kiuj toleras nenium memtrompiĝon.

Kvankam oni certe ne povas aserti, ke la scienco ĉiutempe tenis sin libera de ĉiu eraro, tamen ĉiu miskonkludo, al kiuj sciencaj esplorantoj subfalas, estis pli aŭ malpli frue elmontrata de la *sama* scienco kiel *neallasebla*.

Kiel *ĉiu* terhoma ekkonado, tiel ankaŭ la scienco estas subigita al la eblo *erari*.

Sed kie *vere* estas praktikata pura *scienco*, – kaj ne nur idolservo antaŭ ĝiaj *servantoj*, – tie ankoraŭ ekzistas *multe* pli da garantio de *sekura ekkonado*, ol povos iam doni la sovaĝaj dezertoj, en kiujn nejuĝkapabla apartiĝemo lasas sin logi de la *fantomo* de la libereco.



## Konscio pri la realo

Ĉiu tera homo reganta sian *penskapablon* kaj siajn *sensojn*, siamaniere opinias sin *konscia pri si mem*, ĉar li scias pri *sia korpo* kaj pri la *reagoj* de la lin ĉirkaŭanta *ekstera mondo*, percepteblaj per organoj de la korpo.

Plue, ĉiu scias pri la *nomo*, kiun aliuloj iam donis al li, kaj konas ĝis certa grado la *branĉojn de familio*, al kiuj li, kiel frukto de unuiĝo, ŝuldas sian korpan ekziston, eĉ se li eble preferas *malbeni* tiujn, kiuj donis ĝin al li...

Li scias pri sia pozicio en la mondo, – scias, kion li agante sukcesis *akiri*, kaj kio dezirata ŝajnas resti *rifuzita* al li.

Tute certe li ankaŭ scias pri siaj *titoloj* kaj *privilegioj*, se ili estis denaskaj aŭ donitaj al li dum lia vivo...

Malgraŭ ĉio ĉi li ankoraŭ tute ne scias pri sia *realo*, ĉar ĉio, kion li konas je si, estas io nur portempe *alprenita* kaj kun tute nedubebla certeco estos iam *forprenata* de li. – –

Sed ekzistas io, kion neniu bezonas *alpreni*, aŭ demeti, ĉar li eterne *estis* kaj *estas* kaj *estos* tio, eĉ se li *perdas* la potencon eterne senti sin *identa* kun tio menciita.

Ekzistas en ni io, kio *ne* estas el tiu ĉi tero, kvankam en nia tera ekzisto ĝi estas *kaptebla* nur en *terece* difinita formo. – –

*Tion oni esploru kaj sondu!*

*Tion, antaŭ ĉio alia, oni perceptu en si mem!*

Kiu ne sondis tiun *Unu* en si, tiu egalas almozulon, kiu vagas tra mallumaj stratetoj inter bone ŝlositaj domoj, kaj mal-esperante rigardas supren al la helaj fenestroj montrantaj al li,

ke la aliaj celebras sian feston, – dum li ankoraŭ ne estas „invitita“ al *sia* festo...

Ekzistas tiom multaj, kiuj, egale al tia almozulo, ankoraŭ erarvagas en „mallumaj stratetoj“ kaj celas *ebriigi* sin en ĉiu „kelodrinkejo“ vendanta animajn narkotajn venenojn, por *forgesi* sian mizeron, dum aliaj apenaŭ hontas pri sia mizero kaj eĉ parade elmontradas ĝin. –

*Egoismo*, en la senso de memakcentado *volanta agnoski nenion apud si*, prave estas rigardata kiel *malaprobinda*; tamen oni estas tentata alvoki ĝin, vidante, ke multaj miloj „*forgesas*“ sin mem, kaj vere ne por utili aliulojn...

Firme ĉirkaŭpremita en amaso, kies individuoj, escepte de malmultaj facile nombrelaj, jam antaŭ longe „*forgesis*“ sin kaj anstataŭe pensas, ke ili nomis sin, kiam ili diris sian eksteran „nomon“, homo fortirita kun tiu amaso nur malofte rimarkas, ke li ne scias pri *si mem*, kaj ke li konas nur la portempe aldonitajn buntaĵojn, kiuj „*markas*“ lin. –

Kuŝas *tro multe* da kontentiĝemo en tiu memfordonado, nur pro tiuj aliuloj, kiuj samamane ne scias pri si mem.

Tie ĉi egoismo povus esti „*virto*“, se unuopulo, per la zorgo pri si mem, fariĝus la kaŭzo, ke ankaŭ *aliuloj* estus instigitaj serĉi sin mem...

Por sobra homo restas preskaŭ nekompreneble, ke en tiu ĉi tera ekzisto milionoj ebriigas sin per la *maska fatraso*, kiun ili elpensis al si, ĉar ili ne plu scias, kiuj ili *estas*!

Sed kie *io reala* devas cedi al la nura *ŝajno*, tie sekure triumfas la *trompo*, – kaj trompas sin *ĉiu*, kiu ne plu scias, *kiu* li *estas* de eterne!

La plej alta honoro, kiun la ekstera socia vivo havas por doni, povas esti portata ĉiam nur kiel mantela kovraĵo, aŭ kiel ornamaĵo.

Kiel kio la portanto tiam *ŝajnas*, kiel tio li estas „*rigardata*“ de tiuj, kiuj celas „*atribui gravecon*“ al lia honorado, sed tio, kio li *estas*, tute ne estas ŝanĝata per tiu graveco. –

Se li eble sentas sin *pli elstara* en la vesto donita al li, ol en la nudeco de sia homanimala formo, tiam li vivas nur en mondo de revoj, estante kvazaŭ la mizera viktimo de la hipnoto de sia vanteco, kaj li estas ankoraŭ treege fora de tio, ke li povus eĉ nur „suspekti“, *kiu li estas!*

El antaŭ longe forgesita konscio pri si mem, ankoraŭ atingas la teran homon la milda suspekto, ke ĉio, kio hodiaŭ faras lin *mallibera*, estas *neadekvata* al li, kaj *ne estas entenata en lia vera esto*.

Nekonscia strebado al *si mem* tiumaniere estas transformata en la konscian impulson al *libereco*.

Tie ĉi, kiel ĉie en la tera ekzisto, la *fantomo* de la libereco tuj sentas sin alvokita de tiu impulso, por nebulo la klarecon de pensado per la trompaj bildoj de brilaj promesoj, kiuj neniam povas trovi plenumiĝon.

Nun ankaŭ tie ĉi la homo serĉas „liberecon“, kiu ne estas bazita en *neceseco*, – kaj kiel „*realon*“ li rigardas la ŝajnbildon de iu freneza teorio, bildon, kiu logas lin ĉiutage pli kaj pli foren de la realo.

Se ne fine terurplena ekkono instigas la homon al *returigo*, tiam la animo de tia dezertomigranto mizere *pereos pro soifo*, aŭ ĝi *sufokiĝos* en la ŝtormvipitaj sabloondoj de revivigita pratempa iluzio...

Sed tian finon oni vere devas malhelpi per la ekkono, konkludebla el nura racia *pensado*, ke libereco *generita de la realo* estas atingebla nur ĉe maldorma *sobreco*, kiu *travidas* ĉiun nebazitan promeson, eĉ se ĝi montriĝas en plej kolorriĉa formo. Kiel povus trovi *liberecon* homo, kiu *mem* katenas sian instinktan reziston, tuj kiam iluzigenerita fantomo provas trompi lian *memtrotaksadon!*?

Kiel povus *libereco* esti atingebla por homo, kiu diligente *forĝas* al si mem la katenojn, el kiuj li deziras eliĝi!? –

Sed ĉiu strebado al suspektata *libereco* tie ĉi ja celas nur la *retrovon de si mem!* –

Oni ne kuraĝas *konfesi* al si mem, ke oni „perdis“ *sin*, kaj do oni *kaŝas* sian mizeron malantaŭ amara lamentado pri la *libereco*, kiu povis perdiĝi nur tial, ke oni perdis ankaŭ *sin mem* en la maskomoviĝado de plej ekstera imponemo...

Certe, oni ankoraŭ konas sian maskon, sed oni ne plu scias fariĝi konscia pri *tio reala*, al kiu tiu masko servas nur kiel tera *kovraĵo!* –

Kaj jam antaŭ longe oni tiugrade alkiutimiĝis al sia masko, ke oni mem sentas sin *identita* kun ĝi.

Oni ne plu scias, kaj ne plu *volas* scii, ke oni krome „*estas*“ *io alia* ol tiu masko. – –

Sed *kelkfoje* tamen venas *duboj*, – sed kiam one ree estas meze de la longe kutima maskerado, tiam baldaŭ forflugas ĉiu demando, baldaŭ dissolviĝas ĉiu dubo!

Estante dejunece kutimiĝinta moviĝi en sia *masko*, oni *timas* demeti ĝin.

En ĉiu spegulo oni ĝis nun vidis sin tia, kia oni *volis* vidi sin, kaj nun suspektas, ke oni *ne plu konas sin*, se oni demetas la bone konatan maskon.

Sed ja estas nedireble *malfacile*, hodiaŭ *malkovri* sin sub sia masko!

De ĉiuj flankoj atakas la serĉanton, kiu volas certigi sin pri sia pranaturo, la plej strangaj instruoj, – pleje el la buŝo de *nekompetentaj* instruantoj, – kaj ĉiuj pretendas esti nekontest- ebla, certa „*vero*“.

En ĉiu el tiuj instruoj, – ĉu ĝi celas revivigi la saĝon de *antikvaj tempoj*, aŭ originis el la cerbo de *nuntempa* homo, – oni certe povas trovi iun aŭ alian formon de *kondiĉata vero*.

Ne malmultaj vortoj de saĝo tie estas prezentitaj – nove formitaj, aŭ transprenitaj el la trezoro de antikvaj popoloj –, kiuj certe meritas esti „*konsiderataj*“ de honestaj serĉantoj.

Tamen, *kiom malmulte* rilatas ĉio ĉi al la *realo*, en kiu baziĝas la *plej fortaj, plej profunden etendiĝantaj* radikoj de la tera homo! –

Ni devas celi *konsciiĝi* pri tiu realo en ni, se ni, post jarmiloj de konstantaj *rabobestaj interbataloj pri la predmanĝaĵo*, fine tamen volas krei vivoformojn, kiuj levas nin almenaŭ tiom alten, ke la kunanimaloj de l' homo sur tiu ĉi tero, – se ili havus la homan *kapablon* juĝi, – ne bezonus por ĉiam *honti* pri li. – –

Por atingi tiun *konscion pri la realo*, estas bezona nek *kredinstruo*, nek *filozofia sistemo*!

Ĝis nun, *neniu* kredinstruo povis preventi, ke la homoj *batmortigis* sin, aŭ eĉ disŝiregis sin *antaŭ* la fina liberigo fare de la morto, multe pli kruele, ol tigro avida pro malsato iam disŝiregis sian predon! –

*Neniu* pensorezulto el la alta cerba laboro de la grandaj filozofoj kapablis *deteni* popolojn de la reciproka diskarnado, tuj kiam la triunuo el *malamo* kaj *envio* kaj *regemo*, tro-

*ekscitis* la animalajn instinktojn kaj *kunplektis* la pensojn kun la *volo al neniigo!* –

Ni devas fosi *pli profunden*, se ni volas trovi en ni la nutreman teron, en kiu ni ĉiuj estas *kunkreskintaj*.

Ni finfine devas pensi *pli profunde*, se ni volas atingi ankaŭ la konsciecon en la *radikoj* de nia esto, kiu konscieco instruas nin ekkoni, kiel ni ligaturas al ni mem la vivoarteriojn, se ni, celante volve grimpi pli alten, premligante ĉesigas la vivoalfluon de *aliuloj*...

Respektoplene ni devas sondi *tion realan* en ni, por eksenti la „bazon“ por *voloŝanĝo*, kiu restas *nepre necesa* por la tuta homaro, se ĝi ne volas rapide degeneri en kanajlan animalaron sur tiu ĉi tero. – –

Bedaŭrinde, aroj da memtrompitaj teraj homoj jam antaŭ longe *suriris* la sangomakulitan vojon, kovritan de ŝlimo de putrado, al tiu degenerado en specion de animalo, kiu devus iam rigardi la praarbarajn simiojn kiel altajn „diojn“. Vere jam estas tempo por laŭte *averti* kontraŭ la danĝero, kiu ne estas haltigebla per mokridado el la buŝo de freneza eraremo.– –

Se vi, kiu legas tiujn ĉi vortojn, volas veni al *konscio pri la realo*, tiam vi devas forlasi ĉian supozon, ke la celo tie ĉi montrata al la strebado de via volo estas atingebla per stranga cerbumado, aŭ per iaj akrobataĵoj de la pensado, en kiuj pleje la laŭsupoza „*reganto*“ de la pensada vivo fariĝas *regato*: – obsedita de la dezirpenso pri sekreta potenco!

Vi ankaŭ tute ne devas akiri al vi tian scion, kian postulas la *scienco!*

Kiu entreprenas serĉi en si la konscion de sia *realo*, tiu povas veni al la celo alstrebata de li nur tiam, se li dekomence

sekvas la vojon, kiun la realo prezentis al li *en lia tera ekzisto*.

Tie ĉi oni ne levu, analoge al la demando de Pilato, la demandon: „*Kio estas la realo?*“ –

Ni trankvile lasu tion al la homoj „*naŭfoje saĝaj*“\*, kiuj je la *deka* fojo ĉiam fariĝas malsaĝuloj!

Tie ĉi vi komence rigardu kiel „realan“ *tion*, kion ankaŭ *infano* sentas kiel sian realon!

Trankvile nomu tiun „realon“ per vortoj, kiujn via lerneja edukado donis al vi por distingi la „nociojn“ necesajn en pensado!

Eĉ se vi estas trejnita majstro en tiu distingado, vi vere ne bezonos oferi vian intelektan scion, ĉar ankaŭ la *efiko* de la realo povas, pro la celo tie ĉi alstrebata, esti akceptata kiel la *fiziksense* perceptebla „realo“.

Eĉ se vi *ne* plu ŝatas nomi „reala“ tion, kion viaj korpaj sensoj lasas vin percepti, tio fiziksense perceptita tamen restas la deirpunkto por la *nocio* pri realo, kiom ajn alten vi pensante levis ĝin. –

En la sama maniero vi nun devas fari tion *fiziksense* „realan“ la deirpunkto de via vojo!

Tio fiziksense „reala“ *plej proksima* estas por vi *via propra tera korpo*, kaj nur deire de ĝi vi progresos sur sekura, rekta vojo, se vi fine volas atingi ankaŭ la *absolutan* realon. –

Estas sufiĉe longa vojo, sur kiu vi devas nun migradi *trankvile* kaj *paŝo post paŝo*!

Sed la celo, al kiu tiel vi pli kaj pli proksimiĝas, donas al vi forton por persisti sur la vojo. –

---

·\*) germanlingva idiomaĵo, kiu moke priskribas homon, kiu rigardas sin mem multe pli prudenta kaj saĝa ol aliulojn. (Rim. de la tradukinto)

Komencu kun la certeco, kiu estas necesa por ĉiu homa strebado, se oni volas iam sukcese fini ĝin!

Ankaŭ tie ĉi validas la malnova saĝa proverbo, ke nenio estas pli malfacila ol la *komenco*.

Sed vi estas libera decidi *mem* pri la maniero de komencado.

Oni postulas de vi nenion alian, ol ke vi celas *enpreni vian tutan korpon*, de la piedoj ĝis la verto, *en vian mem-konscion!*

Vi eble opinias, ke tio jam antaŭ longe okazis kaj ne plu bezonas iun penadon, – sed vi tamen povas kredi al mi, ke vi certe eraras!

Se vi ankoraŭ ne ekiris sur la vojon, sur kiu oni tie ĉi devas paŝi, tiam vi ankoraŭ ne scias, kion ĝi postulas de vi.

Estas diferenco, ĉu viaj *korpoĉeloj* estas sentataj de via *cerbokonscio*, aŭ ĉu via tuta korpo estas *trafluita de via mem-konscio!*

Por tio, kion *neceseco* tie ĉi postulas, estas bezonata *multa penado*, plej granda *konstanteco*, kaj nelacigebla *pacienco!*

Sed tiam vi kun plena certeco *atingos* vian celon, kaj kiam vi fine atingis ĝin, via tuta penado aperos al vi nur kiel tre malgranda prezo por la neperdebla gajno, kiun vi akiris!

Tiam vi atingis la *plej altan* formon de la *libereco* en la sekura *konscio pri via realo*, realo *generita en la eterneco*, kaj nur kun hororo vi rememoros la tempon, kiam vi troviĝis meze inter la trompitoj, kiuj rigardis *fantomon* el tomboj de eraranta deziregado kiel la arde sopiritan liberecon...

FINO



Esperanto-tradukoj de pliaj libroj  
el la instrua verkaro de Bô Yin Râ  
estas elŝuteblaj je la retejo:  
<http://www.a-rehfeldt.de>